



Dumonata kultura informilo kaj esprimilo esperantista  
Unu numero : 5 FF. Unujara abono kun adresaro : 28 FF  
Ĝiri al la poŝtkonta numero 3371 74 M BORDEAUX profite al la eldonanto  
Cercle amical esp. agenais, F 47340 Laroque Timbaut

\*\*\*\*\*

ALVOKO  
AL  
FORAJ  
KAMARADOJ

Ĉiun duan monaton mi atendas kun anticipa plezuro la novan kajeron de "Laŭte!" kun mikso de ia bedaŭro.

"Laŭte!" havas abonantojn en diversaj regionoj dise situantaj sur la tero. Tamen ĝia enhavo estas nur eŭropa. Neniu kontribuo el la du aŭ tri Amerikoj, el Aŭstralio kaj Nov-Zelando, el Ekstrem-Orienta Azio. Nu, la legantoj en tiuj mondpartoj havas ankaŭ ion por diri. Mi pensas aparte pri vi, japanaj amikoj. Vi estas pluraj abonantoj, inter kiuj kelkaj, se ne ĉiuj, estas verkikapablaj. Kial ni neniam ion legas de vi ? Mi vokas al vi : profitigu nin per viaj propraj spertoj. Sendu al ni freŝan blovon el viaj insuloj. El tiu lando, kiun amis nia Lanti, pri kiu ni



revas. El tiu lando, kie lumas la leviganta suno, kie floras en printempo la ĉerizarboj, kaj en ĉiu sezono la sorĉa rideto de viaj ĉarmaj knabinoj. El tiu lando, kie kleraj spertaj teknikistoj kaj diligentaj lertaj laboristoj amasigas efektivigojn, kiuj mirigas nian okcidenton. El tiu progressa lando, kie ĉiuj laboras plej efike en ĝenerala interkonsento. Kaj kie tamen ne mankas sociaj kaj ideaj konfliktoj, kiuj kaŭzas perfortajn stratbatalojn, tion foje ni vidas sur niaj televidekranoj. Vi havas multon por sciigi al ni. Diru pri via ĉiutaga vivo, pri viaj luktoj, pri viaj esperoj. Diru ankaŭ vian opinion pri la temoj pritraktataj kaj debatataj en niaj paĝoj. Ĉio de vi estos por ni tre interesa kaj bonvena.

Do ne hezitu : prenu krajonon aŭ tajpilon, surpaperigu viajn pensojn, kaj sendu al amiko Kribo ! Ni scivole atendas vian kunlaboron.

V A L O

\*\*\*\*\*

*Karaj gelaŭtuloj, karaj gejunulĉakanoj !*

Tiu ĉi numero estas "speciala". Ĝi konsistas el du partoj : la unua entenas la kutimajn rubrikojn (escepte de la debato per ĉenleteroj, kiu aperos en la maja numero), provizatajn de gelaŭtuloj.

En la dua ("Ĉu Sataj Faŭkoj?") sin esprimas junaj membroj de SAT, ne ĉiuj abonantoj de L!, sekve de interkonsento. Tiel, por almenaŭ tiu ĉi numero la gelaŭtuloj povas ekkoni vidpunktojn kaj klopodojn de novalvenintoj en SAT, dum ĉi-lastaj ricevas ideon pri la formulo uzata en "Laŭte!"

Kompreneble, la afero estas tiel aranĝita, ke dispartigas la eldonkostoj. Krome, ankaŭ per kelktaga kunŝvitado super (aŭ sub?) la eldontaskoj, la interkonsentintoj pli bone ekkonis unuj la aliajn kaj esperas eĉ daŭrigi la kunlaboradon profite por ĉiuj aferoj : "Laŭte!", "SAT-Gejunuloj", "SAT-Broŝurservo", en plena respekto al ĉies esprimlibero.


Marcelo kaj Kribo

\*\*\*\*\*

*la venonta numero de "Laŭte!" aperos komence de majo*

\*\*\*\*\*

Neabonanto de "Laŭte!" povas uzi la aldonitan abonilon/mendilon, se interesas ŝin/lin plua ricevo. Antaŭdankon!



## LANDNOMOJ KAJ POPOLNOMOJ

(Vd. L! 64 p.35 - Analiza Gramatiko 8)

La studo de Mimó estas interesa. Ĝi estas kompleta, detala, preciza. El ĝi mi konfirmiĝas en mia opinio, ke la nuna sistemo, kiu derivigas iujn landnomojn de popolnomoj, kaj en aliaj okazoj popolnomojn el landnomoj, estas lama kaj kaosa.

Tiu sistemo estas bazita sur arbitra distingo inter landoj el la areo de antikve civilizita mondo kaj pli nove kreitaj regnoj. Se tiel estus, kial Ĉekoslovakujo kaj Jugoslavujo ? Ĉu origine Ĉeko, Slovako aŭ Sudeta Germano sin sentis vere Ĉekoslovako, kaj Serbo aŭ Kroato sin sentis Jugoslavo ?

Inverse, usonano aŭ sovetiano akiris fortan nacian senton kaj patriotismon. En tiaj okazoj, kio fariĝas la distingo ? Jes, la (pseŭdo)regula solvo estas lama kaj kaosa. Pri tio konsciis Zamenhof, kiu rigardis ĝin kiel provizoran, kaj esprimis la deziron, ke iam estonte la landoj ricevu pure geografiajn nomojn. El tiuj nomoj logike deriviĝus la popolnomoj per la sufikso -ano.

Mi pretendas ke :

1. La landnomoj kun **io** ne estas kontraŭfundamentaj.
2. Ili konsistigas koheran, logikan sistemon.

1. La formo kun fina **io**, iniciatita de Hodler kaj propagandita de Lanti, ne estas kontraŭfundamenta. Ĝi estas konforma al la 15a regulo de la Fundamento, kiu permesas esperantigi fremdajn nomojn, kiel delegacio apud delegitaro kaj redaktoro apud redaktisto (Ĉu tio estas bona, eblas pri tio diskuti, sed tio estas alia demando). Atentu : ne temas pri enkonduko de nova sufikso : ne Ital-o, Ital-i-o, sed Itali-o, Itali-ano : la fina **i** estas integra parto de la radiko. Cetere, post longa rezistado (Cart, Butler), la Akademio, gardisto de la lingva identeco, akceptis "**io**" apud "**ujo**" kaj "**lando**".

2. La ĝeneraligita formo kun **io** estas oportuna, kohera, logika.

Rimarko I - En p.40, unua alineo, Mimó diras : "greklandanoj, franclandanoj, pollandanoj, estus pleonasma". Ŝajne li ne tre atente legis la Fundamenton. Ĉar ie en la Fundamenta Ekzercaro estas jena frazo, kiun mi citas laŭmemore, ĉar mi ne havas la tekston nun sub la okuloj :

"Germano kaj franco loĝantaj en Rusujo estas Rusujanoj, sed ne estas Rusoj".

Tiel Zamenhof distingis la regnan apartenecon (Rusujano) disde la genta (nacia, popola, etna) : Ruso. Sed tiu nocio estas malpreciza, konfuza. Laŭ usona leĝo, ĉiu homo naskita sur usona teritorio estas usona nacio. La nacioj rusa, germana, franca, ktp, ks. ne estas malpli artefaritaj, historie, ol Ĉekoslovakio, Usono aŭ Sovetio. Mi ne rigardas min kiel "Francon" sed kiel franclingvan francianon (civitanon de Francio), kaj kiel esperantistan mond-civitanon.

Ĝis fondiĝos tutmonda unio, ĉiu homo estu civitano de la lando, en kiu li loĝas, sendepende de sia "genta" deveno.

Ni forlasu la gentdevenajn landnomojn kun sufikso **-ujo** aŭ **-lando**, kaj adoptu unuforme la (radikon) finliteron **i** : i-o, i-ano.

Rimarko II - Oni kontraŭmetos apartajn ekzemplojn, kiel Brazil (lando), Brazilia (urbo). Nu, sufiĉas decidi, ke la ĉefurbo estu Brazilo, la urbano brazilano, la lando Brazilio, la landano Braziliano. Simile, ni forigos la nunan konfuzon Meksiko (ĉu lando, ĉu urbo?), dirante : Meksiko (ĉefurbo), Meksikio, lando, Meksikano (ĉefurbano), Meksikiano, landano.

Iam Butler kontraŭmetis al mi la ekzemplon de England (lando) kaj Anglia (provinco). Kial ne Anglio por la lando kaj Englio por la provinco ?

Per la ĝeneraligita **io** estas solveblaj ĉiuj tiaj apartaj problemetoj.

Konklude : la ĝeneraligo de **io** en landnomoj kaj de **i-ano** en popolnomoj (ne "gentnomoj!") liveras koheran solvon al tiu tikla demando kaj ĝi nenion ŝanĝas en la Fundamento. Mi daŭre pludiros, ke mi estas franciano, ĉar mi loĝas en Francio kaj samtempe ano de la tutmonda Esperantio.

Valo.

### LANDNOMOJ

La vorteto "**uj**" havas tri malsamajn sencojn : "korbo", "arbo", "lando". Se ĝi taŭgas por korbo, ĝi ne taŭgas por arbo aŭ lando! Ĝi restos tia en poezio, sed en ordinara uzado "**i**" taŭgas. Espereble oni uzos ĝin pli kaj pli. Se la fundamento de E-o estas simpleco kaj logiko, oni devus uzi ĝin por ĉiuj landoj

(Usonio, Kanadio...) kaj forgesi la nunajn komplikegajn regulojn! (Kiel ĉiam, konservemaj poeziistoj konservu la sanktan fundamentecon, ordinaruloj antaŭeniru!)

P.M.G.

### Pri "NIA ANGORPLENA SOCIO" (L! 64)

(Gaste en "Laŭte!", letero de leganto el Ĉeĥoslovakio)

"...En via ĉi-januar "Laŭte" mi trovis la vastan artikolon "Nia angorplena socio" far ĉeĥa vivruinulo Milan Šimečka. La sama aŭtoro, kvankam tiam sub anonimo, publikigis antaŭ du jaroj en "Sennacieca Revuo", preskaŭ la samenhavan pamfleton "Sub signo de timo". Pro pli granda "sensacio" la redakcio de la menciita revuo indikis ke "la aŭtoro devis forsendadi la enhavon de ĉi tiu artikolo po partoj al diversaj personoj en Francio"... Nuntempe la skizofrenia aŭtoro pensas, ke vasta legantaro jam forgesis iaman babiladon kaj provas - ĉi-foje sub "traduko de Aldo Revel" denove siajn klaĉojn prezenti sur la konvenaj paĝoj de "Laŭte". Kaj ne nur ĉi tie, ankaŭ redakcio de "Sennaciulo" jam de nun per reklamoj distrumpetas - kvankam ĝi "sennacieca" : "Ni publikigos la vastan artikolon far la ĉeĥa disidento M. Šimečka - legu nian revuon!" Mi certe legas ankaŭ ĝin, ĉar mem proprumas la SAT-numeron 33018, do "Sennaciulo" servas al mi kiel la unusola spegulo kaj kontaktaĵo inter mi kaj SAT-organizo. Mi ne estas kaj neniam estis komunisto, kontraste al tio mi vivis kelke da jaroj en "okcidentaj" ŝtatoj, precipe en Kanado - do mi povas komparadi multe da flankoj de ĉiutaga vivo, politiko ktp. sen iu emocio ne misuzante la naciajn diferencojn por plibonigo de mia persona "egoo" - kiel la karaktere erara kaj en siaj vizioj katenata M. Šimečka.

Certe, ankaŭ en Ĉeĥoslovakio, samkiel en aliaj (landoj) ne estas absolute ĉiam en ordo. Sed neniu, eĉ ne tiel nomata "disidento", povas fieri pro "zorga akompano" de la sekreta polico, kaj la Ĉarto 77 ? - senpotenca kompanio, kelke da dekoj da nerealaj homoj, kiuj jam preterdormis tempon, kvankam ili povas agi, neniu juĝinta civitano favoras al ili... En unu punkto estas la aŭtoro prava... Ke plejparto de loĝantaro ne interesiĝas pri politiko. Ili preferas personan profiton, amasigon de la aĵoj, mono, havaĵo - vivante kaj ĝuante ĉiujn socialajn certecojn de la ĉiutaga vivo, senpagan sanzorgon, sufiĉan kaj riĉan elekton de la nutraĵoj, kiuj estas aĉeteblaj kontraŭ neglektata prezo, certigitan laborpostenon, sen minaco



de senlaboreco. Ankaŭ ĉe ni jam ekzistas ja multe da milionuloj, sed ne ekzistas almozuloj. Ĉe ni povas homoj libere moviĝi surstrate, en vendejoj, stacidomo sen timo, ke ekmortigos ilin la bombo de iu teroristo. Niaŝtata polico, kiu certe ekzistas, kiel en ĉiu ŝtato, preparadas nenian atencon en Nova Zelando, kie la franca detruis ne nur "pacan ŝipon", sed ankaŭ la homan vivon...

Dum la pasinta somero vizitis min SAT-geanoj, geedzoj L. Krom la tritaga restado ĉe mi, ili travojaĝis multe da lokoj en la tuta Ĉeĥoslovakio. Demandu al ili, ĉu dum ilia vizito estis iel persekutataj, ĉu ili nur ekvidis ian "signon de la timo, mallibereco ktp." en lando! Mi estas certa, ke al la plej bona ekkono povus servi la persona vizito de la diskutata Ĉeĥoslovakio. Kial ne? Mi mem estas la unua el aliaj, kiuj volas bonvenigi la interesulojn, gastigi ilin, akompani, per la neoficialajn renkontiĝojn por libera diskutado...

Mi akre protestas kontraŭ la provokema artikolo, kiu krom ke ĝi jam longtempe ja ne estas aktuala, alitordas la realan efektivecon kaj, eksigante la personecon de la ne tro spirite sana aŭtoro mem, kompreneble la artikolo apenaŭ ekservos al la pli bona, reciproka kompreno, nur ke ĉi tiu fakto ekzistus kiel la ĉefa celo de la artikoloj en "Laŭte" kaj sekve de tio ankaŭ fariĝus "elokventa tribunon" por plua miskompreno inter tutmonda Esperantistaro kaj ties movado."

S-ano Emil Egner, Trida Miru 19, CS 370 01 ĈESKÉ BUDĚJOVICE

## LETERO EL RUMANIO

"...Skribas al vi juna malespera rumano. Tutcerte, vi ne ricevas ofte similajn leterojn, tial mi antaŭdankas vin pro la atento kun kiu vi legos mian veleteron.

Mi naskiĝis antaŭ preskaŭ 30 jaroj ĉi tie, en vilaĝo C., distrikto C., Rumanio. Kvankam, dum multaj jaroj mi lernadis kaj laboris en urbo C., nun mi loĝas denove ĉe miaj gepatroj, en vilaĝo, ĉar mi estas senlaborulo nepagata. Mi estas informadikisto, sed nur malmulte praktikis mi tiun laboron.

Mi ne estus skribanta al vi tiun leteron, se ĝi ne estus rilatanta al homaj rajtoj (fakte ne la letero, sed mia malespera situacio).

Kiel skribite, mi estas senlaborulo nepagata, ĉar antaŭ 3 jaroj mi decidis elmigri, pro la samaj homaj rajtoj (tute ne respektataj ĉi tie). Sufiĉe facile mi havigis mian elmigran pasporton sencivitanecan, fine de julio 1984. Ekde tiam, mi vizitis aron da ambasadoroj por ricevi enirvizon. Jen pasis

unu jaro kaj duono, kaj eĉ ne unu ambasado respondis favore al mia peto. Tiele, la landoj, kies reprezentantojn en Rumanio mi vizitis, respektas la homajn rajtojn (Kanado, Usono, Britio, Aŭstralio, Francio, Finnlando, Svedio, FRG). De ĉie mi ricevis nur neajn respondojn. Kial? Ĉar la migrado de oriente okcidenten ne estas bone taksata, estas eĉ nedezirata. Mia situacio estas des pli malfacila, ke mi ne rajtas labori sed devas pagi mian restadon en Rumanio. Miaj gepatroj apenaŭ sukcesas travivi siajn malfacilaĵojn. Kaj jen, nun, ankaŭ min ili devas monhelpi. Ĉar nur mia patro laboras, la situacio estas ankaŭ pli malfacila.

Mi decidis elmigri kaj tion mi faros (kiam?), sed nur oficiale. La kompetentaj rumanaj organoj liverigis al mi pasporton, sed tio ne sufiĉas por forlasi la landon. Facile ili observis la rajton elmigri, sed kien enmigri dum neniu akceptas min? Alispeca pruvo pri la observo de homaj rajtoj!

Mi ne skribas al vi por peti helpon (fakte mi eĉ ne scias kiamaniere vi povus helpi min) sed por konigi mian situacion (ne izolatan) al vi, kaj pere de vi, ankaŭ al aliaj.

La geesperantistoj interhelpas sin, sed ne ĉiam tio eblas, tial mi ne atendas de vi helpon, nur konfirmon pri la ricevo de ĉi letero.

Por pli bone prezenti min, mi sciigas al vi, ke mi esperantigis (antaŭ pli ol 5 jaroj, kaj favore agadis por E-o spite seriozajn malfacilaĵojn). Mi estas UEA-membro (pere de Fondajo Canuto) ekde 1981. Krom rumane kaj E-on, mi parolas bone france kaj bonete angle. Dum multaj jaroj mi laboris kiel ĉiĉerono, eĉ franclingva.

Pro facile diveneblaj kaŭzoj, mi ne povas tro multe skribi al vi, tial mi finas tie ĉi mian leteron...."

## HO! MIA KOR...

Jes ja, mia koro ĉesis bati dum kelkaj eternaj sekundoj, kiam mi legis la paĝojn 23an, 24an kaj 25an de la 64a numero de **Laŭte!** Frapis miajn okulojn la esprimoj: "pri kontraŭproprietismo, sinparolado, anarĥiismo kaj aliaj frenezajoj", "anarĥiismo lamas... je ambaŭ piedoj", verkita de "k-do" Pako la tria. Mi tuj rigardis miajn krurojn, kaj efektive mi konstatis, ke mi komplete lamis.

Sed mi devas konstati, ke mi ĝuas esceptajn oportunaĵojn: mi loĝas sur la placo de la Respubliko, en PARIZO. Malgraŭ mia handikapo, mi tuj saltis sur la ŝaltilon de mia radioaparato. Daŭre, sur 89,5 MHz, RADIO-LIBERTAIRE (Liberec-



ana Radio), laŭtparolilo de la Franca Anarkiista Federacio, ligita al RADIO-ESPERANTO senĉese elsendis. Uf! Tio ne sufiĉis al mi. Malgraŭ mia lamado mi tuj kuris al la librejo PUBLICO kie, kiel ĉiutage, bonege vendiĝis niaj eldonaĵoj. Iom pli sekura, mi trairis bulvardon "Le Temple" kaj eniris la ĵus inaŭguritan "TLP" (Teatro Liberecana de Parizo), kiu akceptis min per sia komplete lukse renovigita kadro (eksteatro DEJAZET), kun siaj 500 komfortaj foteloj kaj la voĉo de Léo Ferré, kantanta "La anarkiistoj".

Preskaŭ komplete serena mi hejmenrevenis kaj retrovis sur la bretoj de mia biblioteko miajn malnovajn amikojn: Bakunin, Elizeo Reclus, Kropotkin... kaj mi devas agnoski, ke dum tiu ĉi ege rapida vojaĝeto mi konstatis, ke ĉiuj amikoj, vivaj aŭ mortaj, ambaŭpiede lamis. Ĝis nun mi neniam tion rimarkis... Kompreneble, mi tuj ekzamenis la sintenon, la proponojn de tiuj, kiuj ne lamas, tiuj, kiuj fiere staras sur firmaj piedoj, tiuj kiuj adoras la proprietecon, kaj mi malkovris, ke el tiu ĉi centra koncepto ili deduktis jenajn konsekvencojn: la hierarkion, la Ŝtaton, la registarojn, la armeojn, la militojn, la mizeron, la malegalecon, ktp...

Fine, tiuj belegaj, realistaj atingiĝoj ne tre allogis min. Kaj mi decidis daŭre akompani miajn kandikapajn kamaradojn. Stulte kaj azene via, ambaŭpiedlamanto **Yves PEYRAUT**.

## PRI MERDMUŜOJ

Asertoj de pastro pri paradiza postmorta vivo, ĉe baldaŭ mortonta dikredanto, povas helpi tiun ĉi sufiĉe serene trapasi tiun momenton.

Al baldaŭ mortonta liberpensulo la konvinko, ke estas nenia postmorta vivo, tiel efikas kiel la kredo je paradiza vivo. Tiu konvinko igas min fortanima, kaj ebligas al mi sufiĉe stoike konsideri mian vivfinon.

Ni scias, ke nia korpo transformas la materion; la "postmorta vivo" estas la daŭrigo de tiu procezo.

Tiuj ĉi supraj rimarkoj memorigas al mi legaĵon; mi neniam forgesis ĝin, kvankam mi legis ĝin antaŭ kvindek jaroj. Ĝi estas tiel trafa, laŭ mi! Mi trovis ĝin en romano: "La ametista ringo" (L'anneau d'améthyste) de Anatole France. Pastro, ĉe mortanto, faris la samajn asertojn, kiel tiujn ĉi-supre skribitajn. La mortanto respondis ilin: "Vi asertas, ke la reganto, kiu estras tiun postmortan vivon, estas la sama, kiu estras la vivon sur nia terglobo?! - Jes! diris la pastro. "Do mi konas lian estradon..." (subkomprenite: Tia postmorta vivo ne estas esperinda). **Suzanne**

## ĈU KRISTANO POVAS ESTI SINCERA ?

Mi ofte rimarkis, ke ateistoj kredas, ke kristano amas sian proksimulon nur pro timo de la terura infero, aŭ por iri al la mirinda paradizo. Nu, pri la demandoj: Kio estas la Homo? De kie ĝi venas? Kien ĝi iras? min plene kontentigas la respondoj de Pierre Dac, kiujn mi citas laŭmemore: "Mi estas mi, mi venas de mia hejmo, kaj mi revenas al ĝi". Tamen mi konscias, ke plimulto de kristanoj kredas je postmorta vivo. Tial mi volas ekspliki, ne tion, kion mi nun kredas, sed tion, kion en 1960 (antaŭ la koncilio) instruis al mi tute tradiciaj katolikaj pastroj:

Estas tri motivoj, pro kiuj katoliko povas bedaŭri siajn pekojn:

- unua nivelo: li timas la inferon
- dua nivelo: li deziras la paradizon
- tria nivelo: li amas Dion.

Kompreneble, estas pli bone bedaŭri siajn pekojn pro timo de la infero, ol siajn pekojn tute ne bedaŭri. Tamen bona kristano estas tiu, kiu atingas la trian nivelon. Iom poste, samaj pastroj instruis al mi, ke la paradizo konsistas el tio, ke oni kontemplas Dion dum la tuta eterneco. Do mi ne vidas la diferencon inter la dua kaj la tria niveloj: kial oni dezirus kontempli Dion dum la tuta eterneco, se tion oni ne amus?

Tio estas la plej tradicia instruo de la katolika eklezio: Bona kristano estas tiu, kiu agas pro nura amo al Dio. Estas tre facile por kristano akcepti la fakton, ke deistaj liberpensuloj kaj eĉ ateistoj vivas morale kaj virte. Ĉu reale estas malfacile por ateistoj kaj agnostikuloj akcepti la fakton, ke kristano kondutas morale, ne pro la sistemo de la karoto kaj la bastono, sed ĉar:

- la emo al interhelpo estas universala, do ĝi manifestiĝas ĉe ĉiuj homoj, eĉ ĉe tiuj, kiuj kredas dio(j)n
- ĉiu homo havas konsciencon, ankaŭ kristano
- ekzistas en la kristanaro, kaj eĉ en la pastraro, homoj, kiuj sincere provas akordigi siajn agojn kun siaj konvinkoj?

**Valo** skribas, ke li volonte konfesas la kvalitojn de tiuj, kiuj kredas aŭ pensas alie ol li, kaj mi scias, ke sincere li tion skribas. Ĉu vere liberpensulo bezonas 80-jaran klopodadon por atingi tiun sintenon?

**Jakelino**

## PRONOMOJ

La E-aj pronomoj respondas ja ekzakte la ordinarnajn anglajn. Oni tamen trovas en la angla formojn kiel "ye" aŭ "'m". Kaj

la germana aŭ la hispana estas multe pli riĉaj ol la angla tiurilate. Kial ne uzi formojn, kiuj ekzistas virtuale, kiam necesas ?

P.M.G.

## ĈU NI DEMETU LA ĈAPELOJN?

(Vd. L! 64 p.48 - Aforismoj)

Laŭperiode, bonintencaj esperantistoj (mi prefere nomus ilin nov-idistoj) proponas reformi nian alfabeton per forigo de la supersignaj literoj.

Mi demandas :

1. Ĉu tiu reformo estus ebla ?
2. Ĉu ĝi estus dezirinda ?
3. Ĉu estas motivo por ĝi ? Ĉu estas vera demando?

1. Ĉu ebla ?

Estas facile anstataŭigi **j** per **j** (kaj **j** per **y**), **ŭ** per **w**. Restas kvar anstataŭigendaj literoj, kaj nur du disponeblaj, nome **q** kaj **x**.

**h** estas jam ĝenerale arkaikiĝinta kaj anstataŭata de **k**, kun la apartaĵoj **ĥoro** → **koruso** kaj **ĥolero** → **kolerao**.

Ni povas rimarki, ke **c**, **ĉ** kaj **ĝ** estas kompleksaj fonemaj simboloj, samkiel **x**, kiun Zamenhof anstataŭigis per **ks** aŭ **kz**. Oni do povas anstataŭigi **ĝ** per **dj**, **ŝ** per **x** aŭ **q** aŭ **c**, **c** per **ts**, **ĉ** per **tc**. Tiel ni ricevus vortojn kun iom stranga formo, sed finfine alfabeto estas afero de konvencio.

Konklude : la reformo estus ebla.

2. Ĉu dezirinda ?

Ĝi tamen estus grava ŝanĝo en la Fundamento, kaj ĝi grave aliigus la aspekton de nia skriba lingvo, al kiu ni estas kutimiĝintaj. Mi ne bezonas insisti por konkludi, ke ĝi estas tute ne dezirinda.

3. Ĉu tamen ĝi estus utila ? Ĉu ĝi respondus al vera bezono ?

Ne !

Por la presado, jam longe la esperantaj presistoj posedas la necesajn literojn.

Por la tajpado, ĉiuj francaj tajpist(in)oj disponas sur sia klavaro apartan cirkumflekson, kiun ili facile tajpas super **a** (**âne**), **e** (**bête**), **i** (**dîme**), **o** (**hôte**), **u** (**fût**). Ili ankaŭ povas tajpi **à**, **é**, **è**, **ò**, **ù** (kiu facile anstataŭas nian **ŭ**). Same ili povas tajpi niajn **ĉ**, **ĝ**, **h**, **ĵ** kaj **ŝ**.

Konklude : temas pri falsa problemo. Vera solvo, kaj sole dezirinda, estas : ke esperanto sufiĉe disvastiĝu, por ke oni

fabriku tajpomaŝinojn kun klavaro enhavanta la 26 literojn de nia alfabeto, inkluzive la literojn kun ĉapelo.

Ĝis tiam, oni uzu la francan klavaron, kiu ebligas tajpi la **super c, g, h, j kaj s, kaj anstataŭ super u**.

Tiel ni ne kripligos la Fundamenton, la Zamenhofan esperanton.

Daŭre vivu esperanto ! For la nov-idismon !

Valo

## POR KELKAJ DOLAROJ PLIAJ

Kiel virbovo en la areno Kdo Valo en sia ŝajnrebato al mia lasta artikolo "Kvadraturiste via" (L! 63-64), tretas la verdajn bedojn de honesteco kaj lojaleco kun tiom da senĝenemo, ke tia sinteno aspektus tre amuza... se ne temus pri Kdo Valo, kiu kutime sin esprimas kun pli da pripensemo kaj da retenemo. Ĉu la fakto, ke nura manlaboristo sukcesis ŝanceli liajn karajn idolojn, tiel elrebligas lin? Li diras en alia artikolo de la sama L! 63 : "Mi volonte konfesas la kvalitojn de tiuj, kiuj kredas aŭ pensas alie ol mi". Lia ŝajnrebato estas ja bela "ekzemplo de ĝentileco", ankaŭ de tipe blinda zeloteco dediĉita al la defendo de arbitre elpensitaj dogmoj.

Konstateble li nenion provis, nenion kontrolis, nenion komprenis : "Tro da lumo ne toleras la okuloj,

Kiuj estas nur de nokto la spertuloj."

Konsekvence li erare konkludas kaj preferas senskrupule kondamni la "herezulon" al ŝtiparo, ol provi kompari ideojn kaj procedojn. Li akuzas min blufi, sed kiu fakte blufas? Ne mi, kiu tute malkaŝe montras miajn kartojn kaj insiste petas la L!-legantojn kontroli ilin. Tiuj, kiuj blufas, estas tiuj, kiuj de pluraj jaroj obstrukcas la prezenton de miaj konkludoj ; kiuj, por forlogi min de la temo, senhonte elarkivigas nekonatajn famulojn kaj fulmajn teoriojn senrilatajn kun la temo pritraktata ; kiuj ĝistede gurdas la saman kadukan arion kaj funkcias kiel komputeroj programitaj unu fojon por ĉiam kaj ne kapablas prezenti aliajn konceptojn ol tiujn, kiujn oni enkapigis en ilin de la juneco. Estas ili, kiuj ŝajnigas havi en manoj valorajn kartojn, kiujn ili zorge evitas montri, ĉar eĉ verajn kartojn ili ne havas, sed nur senvalorajn kartonpecojn imitantajn kartojn. Simile al la Reĝo de la Andersen-aj fabeloj, ili paradas tute nudaj, kredante esti vestitaj de la riĉaj vestaĵoj provizitaj al ili de la du iluzivendistoj religio kaj filozofio, kaj kiam senkulpa infano konstatas : "Sed ili estas tute nudaj!", anstataŭ provi kompreni kaj rezigni siajn iluziojn, ili

preferas ĉiarimede silentigi la bubon kaj daŭre paradi nudaj.

La blufistoj estas ili, la inĝenieroj ne inĝeniaj, kiuj fakte ne povas toleri, ke nura manlaboristo sukcese spitu al diplomitoj.

"Nekapablaj memkompreni, diligente  
Ili zorgas, ke aliaj nekomprene,  
Kaj per drastaj malpermesoj plej atente  
Jen malhelpas, ke en "Tempon" iu venu.  
De la "Pordo" ili, kiuj ne plu scias  
Ĝin malfermi, per obtuza skolastiko  
Memforpelas tiujn, kiuj ekkonscias  
Per malbeno dia kaj ekskomuniko."

(el "Jen la Homo!")

Tiuj miaj malnovaj versoj ja ĉiam aktualiĝas.

La nombro Pi 3,1416, kiun mi cetere uzas kiel ĉiuj, ne estas necesa por kalkuli la dimensiojn de la cirklo, kiuj estas pli precize kalkuleblaj per du aliaj malsamaj procedoj el kiuj unu estas la rilato 7/7,9. La nombro Pi 3,1416 nur estas facila kaj trompa kalkulprocedo, kies ĉefa rolo estas obstrukci kaj maski la vojon al kono de la veraj rilatoj inter la cirklo kaj la kvadrato, kiuj konstatende estas "meti-istaj sekretoj" konigeblaj nur al tiuj, kiuj ĵuris ne riveli ilin publike. Pro tio la temo estas tabua.

Sed por mi profano la Vero ĉiam daŭre restas nenies monopolo. Ĉiu ja rajtas libere zorgi pri sia propra "lumo", kaj lumigi ĉirkaŭ si sen devigo aniĝi al iu ajn sekto, kiu, kiel ĉiu kolektivo, nur celas servutigi kaj vampirigi la individuojn ĝin konsistigantajn. Mia franca gulaganeco\* ja sufiĉas al mi, mi ne bezonas alian.

Mia celo estis prezenti miajn konkludojn en rondo, kie ĉiuj rajtas libere sin esprimi : tio estas farita. Nun la interesatoj mem tabulumu, ĉar

"Nur la trejnanto la trejnadon mem profitas,  
Kaj nur la manĝanto al malsato spitas.  
Por spirit' kaj korpo estas iluzia  
Pero aliula kaj nur fantazia.  
Ĉiu sin mem savu : estas jen la leĝo,  
Per spertado propra : kuracil' kaj preĝo."

(el "Mem", 1972)

Mi trafis mian celon kaj ĉi tie ĉesigas tiun nun superfluan polemikon. Ĝi almenaŭ evidentigis, ke estas vane polemiki pri la "pulĉinelaj sekretoj" de homoj nur komputeroj. Tio malgrade pli reliefigas la utopiecon de Esperanto, kaj montras, ke la konfuzo de la lingvoj dum la konstruado de

la Babelturo ne okazis pro la dekreto de iu "Dio", sed pro la orgojlo mem de la homoj, kiu instigas ilin sin konsideri superuloj, mastroj, majstroj kaj "paŝtistoj-ekspluatistoj" de siaj homfratoj. Kaj, antaŭ tiu konstato, la franca manlaborista gulagano, kiu mi estas, laŭte kaj proteste ekkrias, ĉar konstatende la samo okazas hodiaŭ ĉe la tempo de Esperanto kaj de la "Stelmilito", "Merdon!" al la "Reĝoj-de-la-tuta-Tero", kiuj senkompate militigas la homojn por iom da potenco, da gloro, da scienco, kaj "por kelkaj dolaroj pliaj".

\* Gulago = sovetia koncentrejo. La nacioj estas la gulagoj de la homaro.

En Eymet 1986/02/07  
Anonima B.G.D.(Eymet)

El letero de Valo : "En mia "respondo al P.M.G." n°64, p.47, du malgravaj tajperaroj : mankas la negativaj eksponentoj en  $10^{-5}$  (centmilono),  $10^{-6}$  (milionono)."

La tajpinto petas pardonon ! Julia ne kapablas tion tajpi, kaj la tajpinto forgesis poste manskribi la eksponentojn! Honton al li! Ni elpostenigu lin!

## NOMBROJ

Mi tute ne konsentas kun Valo :  $\sqrt{2}$  kaj  $\sqrt{2} / 2$  ne estas periodaj !  $\sqrt{2} = 1,414213562...$  tute ne  $1,414141...$

$$\sqrt{2} = 1 / \sqrt{2} \times 2$$

$$1 / 1,414141... = 0,707142857...$$

$$0,707142857 \times 2 = 1,414285714... \neq \sqrt{2}$$

$$\text{fakte : } 1 / \sqrt{2} = 0,707106781....$$

$$0,707106781... \times 2 = 1,414213562.... = \sqrt{2}$$

Se tio ne sufiĉas : ni scias, ke laŭ la fama demonstracio de Eŭklido  $\sqrt{2}$  ne povas esti anstataŭita per frakcio :

$$\text{Nu : } 1,41414141... = 140/99 \text{ !!!!}$$

Aliaj frakcioj estas eĉ pli bonaj, tamen falsaj :

$$99/70 = 1,4142 (8571429....)$$

$$577/408 = 1,41421 (568627....)$$

$$1393/985 = 1,414213 (19797....)$$

Demonstracio de Eŭklido (antaŭ 2000 jaroj!)

Ĉu  $\sqrt{2}$  povas esti anstataŭita per frakcio ? Se la oblanto kaj la onanto estas ambaŭ paraj, ili estu ambaŭ dividitaj per 2, do  $A/B = \sqrt{2}$  kun la 3 kondiĉoj : A nepara, B nepara, aŭ A kaj B ambaŭ neparaj.

Kvadratigante :  $A^2/B^2 = 2$  aŭ  $A^2 = 2B^2$ , do la oblanto A estas para, ĉar neparo kvadratigita iĝas nepara dum  $2B^2$  estas para.  $C = A/2$ ,  $2C/B = \sqrt{2}$ ,  $4C^2/B^2 = 2$ ,  $2C^2/B^2 = 1$ ,  $2C^2 = B^2$ . Do  $B^2$  estas para kaj la onanto B estas para.



*La du konkludoj estas kontraŭdiraj kun la komencaj kondiĉoj, do la frakcio ne povas ekzisti (absurdaĵo).*

**P.M.G.**

## **Koran bonvenon al Koffi Gbeglo !**

Mi tute komprenas lian amarecon kaj aprobas liajn trafajn argumentojn, lian klarvidan esploron de la interna ideo, de la celo de Zamenhof, unuvorte, la SAT-spirito, tio estas : "La anoj de SAT kutimiĝu al eksternacia sent-, pens-, kaj agadkapablo! (Lanti).

Parenteze, tiu esploro respondas la enhavon de ĵus alveninta letero de iu abonanto. Mi provos tiel bone kiel li, klarigi iujn rimarkojn.

Kiel li substrekas, tiu emo ekzistas ĉie en la mondo, eĉ inter samlandanoj. Eblas ne respondi peton, afable kaj ĝentile, kiel Koffi agis. Tia sinteno estus tiu de ĉiuj homoj ; sed ĝi estu tiu de homaranisto. Nu, oni konsideru, ke eĉ en riĉaj landoj multaj loĝantoj perlaboras nur sian vivtenon ; ja ĝi estas multe pli grava ol en malriĉa lando, kaj ne komparebla. Tiuj homoj estas diversmaniere ekspluatataj. Do neblas al ili, donaci, monhelpi, al ĉiuj siaj korespondantoj, eĉ nur al unu... Tio estas nekomprenebla por eksterlandanoj, kiuj aŭdis pri la riĉeco de eŭropaj landoj (ekzemple), kiujn ili konsideras aŭ imagas kiel paradizojn.

Fakte, la regantoj de la riĉaj landoj ekspluatadas (is), i.a. la Afrikanojn, sed tia ekspluatado profitdonas nur al ili, t.e. eta parto de la loĝantaro. Plie, la plimulto ne ĝuste konscias pri la ekspluatado, kaj ne scias kiamaniere oni ĝin efektivas aŭ efektivigis.

Iuj eksterlandaj esperantistoj, kiuj malbone vivas en sia lando, esperas, ke esperantisto de riĉa lando havigos al ili laboron. Ili ne imagas kiel tio estas tre malfacila kaj komplika afero! Celante tion, ili petas gastadon, pri kiu la petito konsentas ; sed, kelkfoje, la gasto restas pli ol unu monaton. Li ne konscias kiel tia longa restado estas maltrankviliga. Jen: se li malsaniĝus, la gastiganto pagus la koncernan elspezon, sen ia ajn helpo. La socia asekurado ne zorgus pri tia kazo.

Mi korespondadas jam de 25 aŭ 30 jaroj kun la samaj gekorespondantoj. Kompreneble, tia korespondado naskis sinceran amikecon ; mi nenion petis de ili, sed pluraj, propramove konkretigas sian amikecon per donacetoj (monbileto, okaze de Novjaro). Eĉ se dum la jaro ili ne donis vivsignon, ili ne forgesas min ĵarfine. Iuj tre regule skribas leterojn

dum la jaro ; tio fortigas la amikan ligan. Unu el ili, ne nur invitis min iri ĉe li eksterlanden, sed ankaŭ sendis al mi la vojaĝkoston (mia patro estis invitita).

Du esperantistaj amikinoj ĵus proponis al mi monhelpon pro ia cirkonstanco.

Mi opinias, ke tiuj tute malsimilaj agoj aŭ reagoj fontas el la personeco de ĉiu.

**Suzanne**

## **KORESPONDADO KUN FREMDAJ LANDOJ**

*Oni povas miri, ke E-istoj koleras pri korespondantoj, kiuj petas donacojn. Ili sciu, ke en multaj landoj petado de donacoj estas tre ĝentila maniero diri "Vi estas sinjoro kaj mi humilulo". Tiu, kiu petas donacon, ne estas ekspluatemulo. Ĉu ĉiuj, kiuj demandas "Kiel vi fartas?" estas kuracistoj ?*

**P.M.G.**

## **Pri "La Nova Paradigmo en Psikologio"\***

"...Mi finlegis "**La Nova-n Paradigmo-n en Psikologio**". Ha! tiu malfacile kapt-ebla unueca perceptado ! Kaj tiu insida procezo META ! Ili multe cerbumigis min. Oni rekomendas cerban gimnastikon por eviti senilecon ; jen legaĵo taŭga tiucele ! Sed ni serioziĝu...

En la komenco mi dubis, ĉu mi legos la libron ĝisfine. Sed jen! Paĝon 31an mi trovis ion, kiu iel rilatas al mia propra sperto, kaj paĝon 32an, ion, kiu rilatas al miaj legaĵoj (**Sciences & Avenir**, iuj libroj). Mia propra sperto estas jena :

Antaŭ kelkaj jaroj mi entreprenis "relaxation" (malstreĉiĝon) per "Training autogène de Schultz". Mia celo estis nur kuraca ; mi serĉis ekvilibron por miaj ŝancelitaj nervoj. Mi legis la libron de P-ro Schultz. Li ellaboris sian "training" (instrumetodon) laŭ la orientaj praktikoj, igante ilin kompreneblaj kaj akcepteblaj de la Okcidentanoj. Tiu "training" konsistas en du partoj, ĉiu el ses ekzercoj. La unua parto rilatas al la korpo, la dua al la menso. Ĉi-lastata timigis min kaj mi decidis uzi nur la unuan. Pro diversaj kaŭzoj mi ĝin praktikis nur sporade, kaj preskaŭ ĉiam sola aŭ kun kasedo ; kiam, malofte, mi estis helpata de iu pli-malpli kompetenta persono, mi iom pli rapide progresis. Cetere la progresoj fariĝis tute ne atendite, kiam mi simple kontentiĝis per la akiritajo sen pensi pri progreso. Mi tiel atingis la 4an ekzercon. La rezulto dum bona, sukcesa seanco, estis jena : mi sentis min varme, bonege ; mi sentis bati mian koron kaj mian sangon pulsi en miaj arterioj ; mi povis eĉ nevole sendi mian varman sangon al la piedoj aŭ al la brusto, aŭ aliloken ; mia kapo estis senpensa ; mi aŭdis la bruojn kvazaŭ ili ne atingus min, kaj mian spiron kvazaŭ ĝi estus aliesa ; mi restis absolute senmova kaj tute perdis la nocion pri tempo. Tiu ekzercado estis

al mi bonfara, trankviliga, ripoziga por la tuta korpo kaj precipe por la cerbo. Kiam mi kapdoloris, la doloro malaperis dum la seanco. Unu fojon, fine de tre malfacila tago, mi estis tre laca ; mi havis diversajn plenumotajn taskojn, sed estis nekapabla organiziĝi ; mi decidis meti min en "relaxation"; post duonhoro mi ankoraŭ estis laca, sed mia kapo estis klara, kaj mi povis ĉion fari bonorde. Homeopato diris al mi, ke tia "relaxation" egalvaloras psik-analizon, kun la avantaĝo ne esti traŭmatiza por la paciento.

Antaŭ kelkaj monatoj mi legis verkon de D-ro Janine Fontaine pri la pri-energia medicino, kiun ŝi lernis de iu Agpaoa, filipina resanigisto. La libro finiĝas per "meditado" de Agpaoa. Ho! Kia surprizo! Longa unua parto de tiu "meditado" estas ekzakte la ... "training autogène" ! De tiam, mi demandas min : kio do estas meditado ? Ĝis tiam mi kredis al la vortaroj : "**mediti**" = longe fiksi kaj koncentrigi sian penson sur io ; enprofundiĝi en pensado". Kiel povas esti meditado iu ekzerco, kiu kondukas al malapero de la penso ? Certe ekzistas alia senco de la vorto... Tial, mi avide legis ĉion skribitan pri meditado en "**La Nova Paradigmo**". Sed fakte oni nomas "meditado" ekzercadon, koncentriĝon por forigi la penson ! Strange ! Mi tute samopinias kiel R.F.Gonzalez, kiam li skribas (P.242) :

"Se meditado estas penso-forviŝado, estas sufiĉe memkontraŭdire pretendi uzi metodon aŭ teknikon (t.e. la penson mem) por mediti."

R.F.G. konsideras tute senutilaj iujn ajn teknikojn aŭ metodojn. Tamen paĝon 150 li skribas :

"...ĉiuj teknikoj estas nur ceremoniaj preparoj, kiuj povas aŭ ne konduki en tiun "agon" aŭ "staton" (unuacan perceptadon).

Nu, la teknikoj ne estas tiel senutilaj ? Ĉu mi rajtas pensi ke, kiam mi estis en la stato supre priskribita, mi estis survoje al la unueca perceptado ?

Mi faris alian sperton pasintjare en la nova ripozdomo, kie ni trapasis unu monaton. Mi faris unu seancan de "relaxation" kun psikoterapeŭtino, Vitoza (metodo de D-ro Vitoz). Ŝajnas al mi, ke tiu metodo pli proksimiĝas al la konceptoj de R.F.G. Oni petis de mi, ke mi aŭdu la bruojn kaj vidu la kolorojn sen ilin identigi ; estis ankaŭ ekzercoj pri la tuŝosento. Tiu tre simpatia virino certe havis personan magnetismon, kiun mi sentis. Ĉe la fino, tute ne atendite kaj surprize, mi ekploris, kaj subite sentis al ŝi varman dankemon, kaj tion mi ne povis ne diri al ŝi. Ŝi respondis, ke tio estas reciproka. Bedaŭrinde la ripozdomo fiaskis, kaj mi ne plu vidis tiun personon, kiu loĝas en V. Sed ankaŭ tio estas tekniko ! Kiel fari ? Kiel fari por esti, por vivi en unueca perceptado?... Mi kredas, ke tion oni ne povas fari sen helpo de iu persono jam konanta tiun staton. Kaj atendante la eblecon lerni la unuecan perceptadon, ni havas la teknikojn, kiuj alportas helpon ne neglektindan.

Sed kion pensi pri la unueca perceptado mem ? Kio ĝi estas ekzakte ? R.F.G. havas pri ĉio simpatiajn konceptojn kaj li estas konvinka. Kvankam mi estas nekapabla kompreni ĉion, kion li diras, mi kredas, ke li pravas.

Antaŭ kelkaj monatoj mi legis ankaŭ "**Le Tao de la physique**" (Tao de Fiziko). La aŭtoro verkis por nespecialistoj kaj sufiĉe klare eksplikas la modernan fizikon. Lia celo estas akordigi la modernan sciencan kun la orienta penso. Li resumas la Taoismon, el kiu mi rimarkis precipe : "ne kontraŭstari". Kio impresis min. Kaj mi trovis ion similan en la diro de R.F.G., p.109:

"La unua paŝo al tiu perceptado estas rezigni nian ĉiopovon fari la bonon transformi la mondon aŭ transformi aliulojn."

Fakte, de ĉiam la homoj baraktas, luktas, preskaŭ senutile kaj sen daŭra rezulto. Necesas trovi ion alian. Marcel Boll vidas la solvon en terapeŭtiko de la nervoj. La propono de R.F.G. estas io simila, sed eble pli profunda.

Mi kredas, ke la unueca perceptado povas esti bonfara por la individuo, utila en la ĉiutaga vivo. Ĉu ĝi povas forigi la interindividuajn konfliktojn ? Eble, almenaŭ parte ; plibonigi la socion ? Ĉu tiel simple ? Mi ne vidas per kiu vojo ! Per la edukado ? Jam de longe estas konata la efiko de la edukado ; la religiuloj de ĉiam uzas tiun ilon por formi la infanojn laŭ diversaj kredoj. Ĉu la homoj estas pretaj akordiĝi pri efika edukado cele al paca homaro ? Nenio malhelpas, ke oni provu ; ĉu oni estos amplekse imitata ? Tion mi pridubas... Malfacile estas prezenti al si, kion oni neniam vidis aŭ spertis. Mi ne kaptas, kiel tia individua stato povas fari, ke oni ĉion komprenas, ĉion scias, kiel ĝi povas ŝanĝi la mondon. Mi restas kun mia malsato.

Du rimarkoj de R.F.G. aparte impresis min :

p.40 - "ni organiziĝas (...) kaj la organizo iĝas pli grava ol tio, por kio ĝi estis kreita."

p.228 - "Se kelkaj personoj organiziĝas kun ideologia celo, ili neeviteble disiĝas kaj fine kontraŭstaras aliajn organiziĝintajn ulojn. Tiu ĉi kontraŭstaro atingas, kiel ni vidas, la ekstremon perdi la respekton al la vivo kaj mortigi unu la alian. Estas tiel do, kiel la penso kaj ĝiaj ideologiaj produktoj iĝas absolute sensignifaj."

Pripensige, ĉu ?....

**H.M.**

\* **La Nova Paradigmo en Psikologio**, de Ruben Feldman Gonzalez. 260 paĝoj, 40 FF kun afranko, ĉe Cercle amical esp. agenais, F 47340 Laroque Timbaut.

Noto de la red. : Alies vidpunktoj pri tiu libro estas bonvenaj. Antaŭdankon!

**Argumento kontraŭ la angla lingvo** : Se en internacia organizo oni akceptus la anglan kiel nuran oficialan lingvon kaj se poste la anglalingvaj landoj forirus (ĉio eblas!) el la organizo.....!!!

**P.M.G.**

## NUNTEMPO

La mondo havas du malsimilajn politikajn ideologiojn, kiuj dividas ĝin en du popolojn. Unu popolo vivas laŭ la "kapitalisma" ideologio, kiu jam estas praava ; la alia vivas laŭ la "marksisma" kun ĝiaj variecoj : komunismo, anarkismo, nihilismo, ktp.

Nun, ĉar la granda plimulto de la popolo, ege okupata pro ĉiutagaj zorgoj, ne estas kapabla pripensi pri "kio estus se...", ĉiuj zorgoj estas konfeditaj al deputitoj, ministroj kaj ŝtatestroj.

Nu, estas facile kompreni, ke homo de Eskimolando ne povas vivi same kiel homo de Francio, de Italio aŭ de alia okcidenta aŭ orienta lando, kaj, ke homo de okcidento kaj oriento ne povas vivi kiel Eskimo.

Pensu nun, ke la usona Prezidento Reagan, kiu estas la plej grava "kapitalista" ŝtatestro de duono el la mondo, volas devigi la alian duonon, nome la "marksisman", ŝanĝi sian vivmanieron, sen ke li kaj liaj simpatiuloj donu taŭgan personan ekzemplon.

Fakte, li kaj liaj simpatiuloj parolas pri homaj rajtoj, blovas ke oni por labori povas sin transloki de unu lando al alia. Ĉu iu sukcesis en tio ? Ne, sub la ŝtata preteksto, ke mankas laboro ! Estas vere, ke en Eŭropo kaj Ameriko estas multe da senlaboruloj. Sed se iu Eŭropano volas iri al Ameriko por laboro aŭ Amerikano volas veni en Eŭropon por la sama celo, tio ne alportas ŝanĝojn en la tutmonda situacio...

- nn -

\*\*\*\*\*

Solvo de la enigmo de n°64

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
1	A	K	V	O	M	E	L	O	N	O
2	N	U		R	E	T	O	R	I	K
3	K	R	A	K	T	I	N	T	A	S
4	O	E	J	O		O	T	O		I
5	R	E	N		P	L	A	N	I	G
6	A	V	E	R	I	O	N		N	E
7	Ŭ	Ā		O	R	G	A	N	O	N
8	F	L	A	T	A		J	U	K	O
9	O	O	M	O	T	O		R	U	
10	J		E	R	I	N	O		L	O
11	E	N	M	O	N	D	I	G	I	S

### PENSO DE PASKALO :

"La vanteco estas tiel ankrita en la koro de la homo, ke soldato, lakeo, kuiristo, portisto fanfaronas, kaj volas havi admirantojn. Kaj eĉ la filozofoj. Kaj tiuj, kiuj skribas kontraŭe, volas havi la gloron esti bone skribintaj. Kaj tiuj, kiuj ilin legas, volas havi la gloron esti legintaj. Kaj mi, kiu tion ĉi skribas, eble havas tiun deziron. Kaj eble tiuj, kiuj ĝin legos..."

(El "Pensoj de Paskalo", ĵus eldonita de SAT-Broŝurservo.



-----  
valo

## EN FRANCIO VENIS NOVA SENTO

La franca ministro pri nacia edukado rifuzas enkonduki esperanton en la lernejojn. Kompense li dekretis, ke la francaj geknaboj en siaj lernejoj kantos la **Marseljezon**, la **Marseljezo**, tiu plej naciista el la naciaj himnoj, plej militista el la militaj marŝokantoj, tiu minaca, buĉinstiga kanto, kiu al glavo sangon soifanta tiras la francan familion. Tiel, pro decido de nia ministro, per la freŝa voĉo de niaj infanoj sonos la militemaj vortoj : "Al armiloj, civitanoj!... Malpura sango trinknutru niajn sulkojn!". Tiel, per flugiloj de facila vento, per la voĉoj de senkulpuloj, tra Francio iros forta voko al armado kaj sangoverŝado.

Pro ordono de ministro "socialista" t.e. teorie internaciista.

Ridinde.

Aŭ plorinde ?

## ĈU BALOTI ?

En tiu ĉi komenco de mia 87a jaro, ĉu mi havas ankoraŭ ion por diri ?

La ŝtataj instancoj postulas, ke la 16an de marto mi partoprenu en baloto por elekti naciajn kaj regionajn deputitojn. Ĉu mi devas, ĉu eĉ morale mi rajtas voĉdoni ?

La rezulto de tiu baloto iagrade kondiĉos la ekzistadon de miaj samlandanoj dum la kvin venontaj jaroj. Ĉu mi tiel longe vivos ? Aŭ eble mi pluvivos en malintensa aktiveco, tre dependa de aliaj : ĉu do tiu afero min koncernas ?

Multaj opinias, ke la maljunuloj devas helpi la junajn generaciojn per la instruo de sia sperto. Sed oni scias, ke la sperto de iu malofte povas servi al alia. Eĉ, ofte, ne al li mem : ĉar la cirkonstancoj konstante varias, kaj la homo ne plene konscias pri la ŝanĝoj. Ofte mi emas referenci al 1914-18 aŭ al 1936\*, sed la nunaj ĉirkaŭaĵoj ne estas samaj kiel en tiuj epokoj. Eĉ 1968\* estas jam malproksima.



Nia skleroza memoro konservas bildojn kaj skemojn ne adekvatajn, ne adapteblajn al la mondo, en kiu ni nun vivas, kaj kies akcelatan evoluon ni lame provas sekvi. Estas ja grandaj pensuloj, kies inteligento transas jardekojn aŭ jarcentojn. Sed, se ni provas apliki iliajn tezojn al la nuna situacio, estas kvazaŭ ni ŝablone tajlus eksmodajn vestojn por modernaj homoj : ili ne taŭge sidas al ili. Mi pensas pri Marks, pri la grandaj ekonomiistoj de la 18a kaj 19a jarcentoj eĉ pri Duboin kaj Bellamy, pri nia Lanti, kc. Ni eĉ ne parolas plu la tute saman lingvon kiel Zamenhof. Ĉio ĉirkaŭ ni evoluas, kaj ni devus adaptiĝi al la ĝenerala evoluado. Tion ni maljunuloj ne kapablas. Ni sekvis pli-malpli bone la industriaran revolucion, la elektran revolucion. Ni anhelas kaj sufokiĝas, provante sekvi la ritmon de la robotiko, de la atomnuklea fiziko, de la informatiko, de la moderna biologio. Ni ne estas plu "en la vento". Ĉio ĉi estas afero de niaj idoj kaj praidoj : ni konsentu transdoni al ili la torĉon, kaj rezignu plu influu la iradon de la aferoj. Sur la monda scenejo ni ne estu plu aktoroj, nur pasivaj spektantoj. Aktivu nun la junaj !

Februaro 1986.

\* 1914-18 : la unua mondmilito. 1936 : Faŝismo en Italio kaj Germanio, popolfrento en Francio kaj Hispanio. 1968 : Majo. Revolucia eksplodo de studentoj kaj junuloj en Parizo, "printempo de Prago".

## PLANOJ PRI LA KOMETO\*

En la kajero n°63 amiko Paŭlo anoncis al ni baldaŭan revenon de la kometo de Halley. Mi atendas tiun revenon kiel viziton de kara malnova amiko. Sed ĉu mi vidos ĝin ? Oni diras, ke ĝi estos malfacile videbla en la tro hela nokta ĉielo de niaj abunde prilumataj urboj.

En la daŭro de mia longa vivo mi vidis plurajn kometojn. Neniu estis komparebla kun Halley. Kiel bela ĝi estis antaŭ 76 jaroj, kiel granda kaj brila! Kaj ne kredis pri plibeliga iluzio el la kara infaneco : mi ja revidas ĝin tre nete kaj precize. Mi vokas por atesto al miaj malmultaj samtempuloj : certe ĉiu el ili konservis en sia memoro saman bildon pri tiu malofta astra spektaklo. Karaj samaĝuloj, eĉ se ĉi-foje ni malbone vidos ĝin, ni konsciu, ke ni estas privilegiuloj, ĉar ĝi vizitis nin dufoje en nia vivo.

En 1910 kelkaj scienculoj kaj pseŭdoscienculoj antaŭdiris, ke la paso de la kometo detruos ĉiun surteran vivon, tion oni

nomis "la fino de l'mondo". En la mezepoko, laŭ popola kredo, la kometoj estis anoncantoj de malfeliĉoj kaj diversaj plagoj. Sendube iuj kredantoj pri tiuj stultaĵoj ne preterlasis rimarki, ke unu jaron poste, en 1911, okazis en la haveno de Agadir la spektakla minaca gesto de imperiestro Vilhelmo II-a, kiu estis kvazaŭ preludo al la granda milito 1914-1918. Tia estas ĉe multaj mensoj la bezono pri mirindaĵoj.

\* Laŭvorta traduko de franca esprimo, kiu signifas : ĥimeraj projektoj.

Valo

\*\*\*\*\*

## ANALIZA GRAMATIKO (9)

\*\*\*\*\*

### La refleksivo (A)

Kiel mi pritraktu la plej malfacilan kaj neesploritan parton de Esperanto, kiam en nia movado estas vasta sektoro, kiu faris skolon, la tradician, pseŭdooficialan skolon, el la kreo-povo de la spontana uzado de la lingvo internacia, fronte al la Zamenhofa koncepto de logikeco, de strikta, racia reguleco ? Kiam oni aplombe kaj belvorte asertas ke nun la gramatiko kaj la studado de la lingvoj fariĝis diakronaj, t.e., dependaj nur de la historia evoluo, kaj eĉ sinkronaj kun la nuna uzado, nome, simple priskribaj kaj imitadaj, kaj ke tia estas la esenco de Esperanto, kaj eĉ ke tia volis ĝin Zamenhof ? Oni jam diris ke mi komplikas Esperanton!

La gramatikaj elementoj de la internacia lingvo estas simplaj kaj limigitaj en sia nombro, ĉar unuopaj kaj regulaj, kaj tio konsistigas la klarecon kaj simplecon de la plej bonstilaj tekstoj kaj faras la lingvon eksterordinare facila rilate al kompreneblo. Tiuj ĉi kvalitoj estas tiom grandaj, ke eĉ misuzata Esperanto ĉiam estas facile komprenebla, almenaŭ per diveno, kaj tio estas bonega kvalito en lingvo internacia.

Sed, ho ve!, Esperanto ne estas tre facila se oni celas, ĉe la uzado, altajn literaturajn kaj kulturajn nivelojn proprajn de kleraj personoj. Estus absurde krei internacian lingvon kun la espero ke ĝi ludos transcendan rolon en la historio de la homaro, kaj krei ĝin tia, ke ĝi devus rezigni havi iam siajn Ŝekspirojn, Hugojn, Cervantesojn, Gojtojn ; sed Zamenhof estis homo inteligenta, la esperantistoj ŝatas diri genia, kaj li intuicie kreis per simplaj elementoj lingvon plejaltgrade racian, uzeblan kun matematika precizeco, tamen klaran kaj facile uzeblan eĉ de ne instruitaj personoj.

Nu, altaj kvalitoj havas altan prezon. La prezo de racia uzo, kiun ne ĉiuj povas same pagi, estas forta strebo de logika rezonado. Ĉi-rilate la vortoj de Zamenhof estis klare gvidaj : "En lingvo arta oni devas obei nur la logikon."

Helpe de precizaj reguloj, normale inteligenta persono apenaŭ bezonas mense strebi, ĉar ĉio estas simpla kaj klara, escepte de la uzo de refleksivo. Kial ? Pro tio ke tiu ĉi, pli cerbumiga, troviĝas en la plej diversaj sintaksaj elementoj kaj ofte por decidi oni devas demandi al si la kialon. Tamen ĝi estas preciza kaj regula kiel la tuta lingvo. Bedaŭrinde, malgraŭ ĉio, fine en tre maloftaj okazoj la kieso ne estas klara kaj necesas precizigo, kiel en la aliaj lingvoj. Tio estas neevitebla, tial ke pli perfekta sistemo ne eblas.

Koste de sia perfekteco, Esperanto plifaciligus multe se oni forĵetus la refleksivon kaj esprimus la refleksivecon ĉiuokaze per **mem** aŭ **propra**, aŭ se oni anstataŭigus per ĝi la posesivajn **lia**, **ŝia**, **ĝia** kaj **ilia**, laŭ la modelo de la eŭropaj lingvoj. Sed Zamenhof liveris al ni ĉi tiun pli perfektan refleksivon, kaj ĉiuj esperantistoj "sie", t.e. "siamaniere", restis fidelaj al la Fundamento, pri kiu ne povas esti diskuto.

La Fundamento estas "sankta", sed malmulton ĝi precizigas. Pri refleksivo sole ke "ĝi rilatas nur al la subjekto de tria persono en la sama frazo", kio ne estas sufiĉa, sed kio tamen trudas la abomenan taskon analizi, malŝatatan kaj kondamnititan de la diakrona skolo. Jen rezultata specimeno el la fama marka-komunista devizo, bone tradukita al ĉiuj lingvoj, sed kontraŭdire al Esperanto :

("El Popola Ĉinio", marto 1985) "De ĉiu laŭ lia kapablo, al ĉiu laŭ lia bezono!"

("Sennaciulo", aprilo 1985) "Ĉiu laŭ siaj kapabloj, al ĉiu laŭ siaj bezonoj!"

La komparo ne estas instrua por la lernantoj. Supozeble la "diakroneco" de la unua fontas el la ĉina lingvo ; tiu de la dua certe el la franca. La rezulto ne estas internacia, sed plur-nacia, ĥaosa.

La malestimata Zamenhofa logiko, nepre necesa por bone uzi Esperanton, trudas analizan kompletigon de la elipsaj frazoj, jene :

"De ĉiu (oni postulos, ke li donu) laŭ sia kapablo, al ĉiu (oni donos) laŭ lia bezono!"

aŭ :

"Ĉiu (donu) laŭ siaj kapabloj, al ĉiu (oni donu) laŭ liaj bezonoj!"

Jen, ankoraŭ, interesa ekzemplo el "Laŭte", 59 : "La ĉenmuntado, kiu pisigis la laboristojn en iliaj pantalonoj."

Oni povus diri ke ĝi estas konforma al la Fundamenta regulo, tial ke la subjekto, kiu pisigis, estas la ĉenmuntado ; sed se oni bone analizas, la pantalonoj estis de tiuj, kiuj pisis, kaj la signifo, jena :

"La ĉenmuntado, kiu pisigis la laboristojn (= igis la laboristojn pisi, faris ke ili pisis) en siaj pantalonoj."

Ni povus diri ke ĉi tiu ekzemplo troviĝas en kaj ekster la regulo. Aliaj, similaj, estas analizendaj alie.

Nu, la enigmoj, kiujn ne solvas la Fundamenta regulo, estas prezentotaj en la proksimaj numeroj.

L. Mimó

\*\*\*\*\*

Por nia medito :

Fragmentoj  
el leteroj de E. LANTI

### ĈU DIALEKTIĜO ?

Al K-do M. "Carey", SAT-ano 1170, Liverpul, Britio

Oni komunikis al mi vian leteron de "June 29th" 1941, en kiu vi severe kritikis lingve mian artikolon, aperinta en la 2-a n-ro de "S.B.". Vi akuzas min pri "amerikanigo" al nia lingvo, tial ke, ekz-e, mi skribis : "La Eternulo de l' judoj ja estis koler-, venĝ- kaj buĉema" ; "Tia ĉiopovulo estas nenial ador- sed nur timinda", "...de l'Du- k Tria Internacioj", "...en la menso de multaj el iliaj viktimoj ankaŭ kuŝas maltoler- kaj komandemo..." k.s. En tio vi signon vidas pri dialektiĝo de nia lingvo - kaj vi protestas.

Estimata K-do, vi estu gratulata pro via timzorgo al nia afero! Sed permesu min rimarkigi ĝis kia grado viaj timo kaj protesto estas senbazaj : ne eblas, ke mi "amerikanigu" esp-on, tial ke fakte mi ne estas amerikano kaj scipovas nur legi la anglan kaj hispanan lingvojn kun ofta helpo de vortaro. Tiu supraĵa scio nepre malebligas, ke ili povu havi influon sur mian esprimmanieron. Plie, mi malmodeste konfesas, ke ĉiutaga uzado de esp-o, ĉu skriba aŭ langa, kaj jam de 20 jaroj, havis kiel rezulton, ke mi rekte pensas kaj kutime monologas en esp-o. Tio povus havi kiel rezulton nur influo sur mian tre maloftan uzadon de mia gepatra lingvo.

Mi jam diris sufiĉe, por ke vi povu konvinkiĝi, ke via bonintenca kritiko estas neniel prava. Kaj nun mi diru mian

miron pri via tre malfrua kritiko pro "mallongigoj". Laŭ via matrikulo mi konstatas, ke vi estas tre malnova SAT-ano ; vi sekve jam delonge povis vidi sur la kovrilo de la jarlibroj de nia asocio jenan moton : **La SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo.** Mi ankaŭ estas malnova ano de SAT kaj sekve scias, ke tiu forme mallongigita frazo neniam estis kritikata...

Kaj nun mi preparolu iomete la esencon de l' demando : ĉu ekzistas danĝero pri dialektiĝo de nia lingvo ? Jes, senhezite mi respondas. Latente tiu danĝero ekzistas, kaj se la disvastiĝo de esp-o okazus tiom rapide, kiom ni deziras, mi ne dubas, ke ĝi fariĝus reala.

Kio karakterizas dialektiĝon ? Ĉefe ĉi tio : 1) uzo de samaj vortoj kun malsama senco; 2) uzo de malsamaj vortoj por nomi saman objekton aŭ aferon. Ekz-e, en via letero vi skribis : "Kaj ĝi (la lingvo, A.) perdos la belan aperon (aspekton, A.) kaj la dignon." La uzo de apero kun la senco de la angla "appearance" estas ja signo de dialektiĝo. Mi menciis alian ekz-on, kiun mi subskrekis antaŭnelonge en gazeto redaktata de klera anglolingvano : "...eĉ forta viro, armita per klubo (bastonego, A.) aŭ pli efika batalilo..." En angla lingvo la vorto "club" havas 4, 5 (eble pli) tre malsamajn sencojn, sed en nia lingvo klubo rilatas nur al iu societo. La forta tendenco uzi la vorton "prelego" anstataŭ la oficiala, Zamenhofa kaj oficiala lekcio estas ankaŭ signo pri dialektiĝo.

En la formoj el mia artikolo, kiujn vi kritikis, forestas ĉiu el tiaj signoj. La radiko de l' vortoj, kies gramatikan finon mi forlasis, konservas sian precizan signifon kaj ilia rolo en la frazo estas klare montrita per la apuda samkategoria vorto kun la necesa fino gramatika.

En mia kazo temas pri stilo kaj ne pri gramatiko aŭ vortara afero. Povas esti, ke mian esprimmanieron vi malŝatas, sed tio nur pravas, ke ni havas malsaman guston, nenion pli...

Kaj nun, ĉar mi konsentas pri ekzisto de dialektiĝa danĝero de esp-o, mi diru mian opinion pri rimedoj por ĝin forigi : 1) necesas ellerni kaj praktikadi nian lingvon ĝis atingo de rekta pensado en ĝi; 2) kontroli la signifon de l'vortoj en **Plena Vortaro**; 3) legi gazetojn, kies kunlaborantoj ne havas la saman gepatran lingvon kaj havi korespondantojn en ĉiuj mondpartoj; 4) esperantigi sian propran nomon, kiel signon, ke oni fariĝis ĝisosta, ĝismedola esperantisto kaj per tio estas en laŭa stato por labori celkonscie al la prospero de la ideala regno Esperantie.

Estimata K-do "Carey", en via letero mi plezure notis, ke vi aprobas, same kiel ĉinaj kaj meksikaj samideanoj, la mallongigon al Kaj je k. Tio pravas, ke vi ne estas blinda adoranto de la tradicio. Sendube vi komprenis, ke per forlaso de du tute superfluaĵ literoj ni ebligas, ke nia malgranda organo entenu pli da teksto kun idea valoro kaj malpli da literiĉa balasto.

Kaj nun mi konklude faru konfesion : kiam mi sendis mian artikolon al la red. de "S.B.", mi klarigis, ke per tiaj nekutimaj formoj mi celis fari eksperimenton, rilate al la lingvosento de la legantoj. Nu, la sperto montras, ke nur vi ĉagreniĝis kaj protestis. Sekve, mi ne dubas, ke vi montros sufiĉe da toleremo kaj ne tro koleros, se okaze aperus iu eksperimentcela skribaĵo mia aŭ aliesia...

Konvenas, ke mi metu finon al ĉi tiu kredeble tro longa babilado. Certe Malate pensos, ke mi estas maltaŭga verkanto, ĉar mi ne kapablis diri multon per malmulte da vortoj kaj tial foruzis pli da spaco ol li mem kutimis en ĉi tiu rubriko. Li ja scias, ke mi parencas kun Ate, la dio, kiu erarigas, dum li estas Malate.

Dume mi restas ŝerce serĉema kaj verama, t.e. Alfesto

Notoj de la tajpanto : "Malate" kaj "Alfesto" estas du pseŭdonimoj de Lanti. Tiu artikolo aperis en "Satana Bulteno", n°6, Nov. 1941. Male al la tiama kutimo, mi tajpis plene "kaj" anstataŭ "k". La "malŝparo" estas vere tre eta!

"Kara K-do, Mi ricevis vian leteron antaŭ kelkaj tagoj kaj ĝojis ĉe la ekscio, ke la anĝela B. atingis vin kaj ke 4 aŭ 5 anĝelanoj en via urbo "ĝuos" ĝin. Sed mi esperas, ke ĉiu ekzemplero restos tamen en relative bona stato kaj ke vi konservos ilin zorge en via arkivo.

Mi neniam dubis pri via fervora patriotismo kaj mi scias, ke vi preferus, ke la franca lingvo fariĝu la internacia interkomprenilo, anstataŭ esp-o. Antaŭ kelkaj dekoj da jaroj ekzistis eble motivoj, kiuj povus nutri ĉe vi tian esperon, sed mi certigas al vi, ke nun la devo de ĉiu franco estas defendi esp-on, batali por ke ĝi fariĝu la komuna lingvo de ĉiuj teranoj. Mi menciis fakton : ĉi tie estas hospitalo prizorgata de francoj, belgoj kaj svisoj ; nu, tie oni parolas ĉefe la hispanan lingvon kaj la anglan. Nur kelkaj kuracistoj parolas france. Mi certigas al vi, ke se mi estus franco mi tre hontus pri tio. Vi devus konigi ĉi tiun fakton al la gazeto "Comprendre", pri kiu vi parolas.



Mi lernis la anglan lingvon antaŭ 18 jaroj proksimume, vivis dum 10 jaroj kun anglino kaj preskaŭ du jaroj en anglolingvaj teritorioj kaj tamen mi ne povas konversacii en tiu lingvo, kiu estas neelparolebla de mia voĉorgano. Kaj la vortoj havas tiom da malsamaj sencoj!...

Kvankam mi apenaŭ lernis la hispanan lingvon, tamen mi pli facile povus uzi ĝin, se necese. Sed mi rilatas nur kun esp-istoj kaj sekve ne havas la okazon longe praktiki tiun lingvon. Okule mi facile legas nun ĵurnalojn ĉi-tieajn, kvankam ofte mi devas uzi vortaron.

La grandaj ĵurnaloj ĉi-tieaj enhavas unu paĝon en angla lingvo, kio pruvas, ke la usonaĉa influo estas grandega en Meksikio.

Mi preferas ne paroli pri la militaj okazoj, tial ke mi timas ofendi vian patriotan senton. Tamen mi diru, ke lastatempe mi emis volontuliĝi por defendi la sendependecon de Persio.

Nun mi projektas iri al Brazilio, sed ne scias, ĉu mi sukcesos akiri la permeson. Ĉi tie apenaŭ ekzistas esp-a vivo kaj tial ofte mi sentas min ekzilita. Kaj, verdire, mi ĉiam deziras esti alie ol kie mi estas. Unuvorte, mi estas tre malsaĝa. Daŭre mia kompreno pri la vivo estas, ke ĝi estas tragedi-farso, kaj la saĝo konsistas nur en ĉi tio : fari ĉion eblan, por ke la farsa parto superu la tragedian...."

(El letero al kdo L., Meksiko, 11.9.41)

Noto de la tajpanto : Komence de tiu letero Lanti parolas pri "anĝela B.", temas pri la "Satana Bulteno", kiu aperis en Ameriko dum la milito. Timante la francan cenzuron, Lanti kompreneble "kamufilas" la realan vidpunkton de Kdo L. kaj ŝercas pri "lia patriota sento"...

\*\*\*\*\*

### ĈE SAT-BROŜURSERVO :

Eĉ iom pli frue ol anoncite, efektiviĝas la eldonprogramo por 1986. Jam estas disponeblaj :

\* **Pensoj de PASKALO** (trad. VALO), 92 paĝoj, 15 FF

\* **Varsovio 1887** (Lopez Luna), 76 paĝoj, 12 FF

Memorige : Por ŝpari iom el la afranko, al la plimultaj broŝur-abonantoj mi sendas la jarkolekton en ununura pakaĵo ĉiujare, aŭ transdon (ig)as okaze de kongreso, aŭ aldonas al eksterabona mendo. Do, ne tro senpacientiĝu !

Elĉerpiĝantaj broŝuroj : Eventualaj interesatoj bonvolu noti, ke restas nur tre malmultaj ekzempleroj de : "Les 16 règles" (SR), "La Zamenhofa Homaranismo" (ZH) kaj "La Blankaj Gardistoj".

(BG)

Kribo

Nia originala novelo :

Hagen Hirte

### OKAZIS EN TOKIO

En mian pasporton oni skribis, ke mi estas denaska usonano, kaj tio estas prava. Mian karieron **made in USA** mi povas rapide priskribi. Kiel knabo mi ege diligentis, ĉar patrino mia petegis ĝislarne al mi : "Penu, knabo mia, penegu!"

Mi penegis ! Baza lernejo. Tiam de la naŭa ĝis la dekdua "high school" en precipa lernejo por naturscienco. Tie mi lernis multon. Libere mi observis birdojn, bredis fruktmuŝojn por genetikaj eksperimentoj kaj ekscitiĝis en diversaj kluboj politikaj. Tiam Harvard-universitato ĉe Boston. Poste, aldona jaro en militakademio, kaj nur tiam mi eklaboris, kompreneble en la militindustrio. Iam tiam mi bedaŭrinde rifuzis partopreni cerbtransplantigojn je "vivantaj objektoj". Oni adiaŭis min, ne sen antaŭe draste minaci al mi. Mi komprenis kaj ĵuris diskreton. Post jaroj sukcesis al mi radikiĝi kiel instruisto por la japana lingvo. En pli-malpli aĉaj kondiĉoj mi lernis obstine la lingvon, ĝis mi sufiĉe flue povis leterkonversacii kun japanoj. Tion, kion mi perlaboris, mi disipis dum vojaĝoj en Japanio, por poste ĉiam denove eki ĉe nenio en Usono.

Mi vivtenis kelkajn jarojn en tiu stilo, ĝis mi fine decidis transloĝiĝi al Japanio. Mi intencis tie kiel angla instruisto enspezi la monon, kiun oni bezonas por ne esti metata en hejmon por idiotoj. Tio okazis, kiam mi klariĝis pri tio, ke homoj kiel mi ne estas bezonataj en Usono. Nuloj kiel mi ne havas la rajton streĉi la nervojn de tiuj, kiuj estas tiom sukcesaj, kiuj estas la veraj usonanoj.

La flugbileto forglutis preskaŭ mian tutan monon, sed mi havis leteramikon en Tokio kaj komencis tuj post la alveno serĉi lin. Nu, tio estas en Tokio multe pli komplika ol en Novjorko. Post kelkaj maratonaj ekskursoj tra la ĝangalo de la egurbo, mi fine malesperigis. Kiel ja oni tie trovi iun, se la stratoj ofte ne havas nomon ? Sed estas vere. Konsternita mi ne estis. Pli mi estus mirinta, se mi estus efektive trovinta sinjoron Suzuki. Miaj konoj pri la japana ne helpis al mi. Kvankam oni ĉiufoje precipe afable riverencis, kiam mi balbutis al iu. Post semajno mi estis kvazaŭ kaputa homo.

Okazis tial en Tokio en eta hotelĉambro, en kiu oni prefere ne elstreĉu la krurojn, ĉar tian kapablas nur japanoj, ke mi perdis la nervojn. Estis malfrue. Mi funkciigis la neeviteblan kolortelevidilon kaj gapis tra la brunece koloritaj fenestrovitroj suben al oceano el lumĉenoj kaj brilaj punktoj. Foje

foje mi suĉis gluteton el la sake-botelo, pensante pri tio, kio esence ligas min surtere al la sufiĉe trista vivo. Ĉu espero ? Tradicio ? Hereditaj informoj, kiuj, veninte el grizaj pratempoj, savigis ĝis en niaj tagoj ? Kiel ĉiam mi ne eltrovis ĝin. En la febla lumo de la televidilo mi stiris perpiede la vojaĝkofron al mi. Mi elakrobatis beletan modelon de germana pistolo kaj metis ĝin je mia prava tempio. Kun absoluta senpartopreneco - kio jam estas pri tio iri en la alian mondon? - mi turnis min denove al la fenestro por adiaŭi Tokion... kaj... fine pafis.

Obtuza bruo, kaj tiam mi sentis min kvazaŭ senpeza. Estis erara sento. Mi nur senemociiĝis. Mi staris salkolone kiel la ino de Lot kaj bezonis kelkan tempon por rimarki, ke io ne laŭordis en la afero. Tute maleble, ke mi preterpafis la tempion! Mi rigardis suspekteme al la pistolo, lumigis la ĉambron, kaj tiam kaptis min malagrabra penso! Mi paŝis al la spegulo kaj rigardis senkrede al mia kopio. Maleme mi hezitis, ĝis mi kapablis retiri la blondajn buklojn malantaŭ la tempiojn. Estis komplete konfuzige. Tute klare la truo en la prava tempio estis videbla. Mi eĉ ne sentetis doloron kaj ankaŭ ne sangis. Sendube la kuglo devintus mortigi min. La malagrabra penso, ke mi estas mortulo komencis disiĝi en mi. Kial ja ne ? Kial mi ne estu morta ? Estas vere, tio tute kontraŭas al la sankta leĝo pri kaŭzo kaj efiko. Kaj tamen : Spite al la truita cerbo mi plene konsciiĝis. Ĉu konscio en morta korpo ? Pleje min frapis, ke mi povis moviĝi. Sed mi moviĝis...

Ke oni ankaŭ povas kutimiĝi je la senkompreneblo, mi ne nur scias ekde mia dua naskiĝo kiel mortulo. Tre rapide mi adaptiĝis pri la nova situacio. Ja, mi konfesas, ke tiu nova ekzisto havas kelkajn avantaĝojn super la antaŭa. Ĝojigite mi rimarkis baldaŭ, ke mi neniam denove estis plagita de la urĝo devi manĝi. Neniam mi plu soifis. Mi fojfoje partoprenis ĉe trinko kaj manĝado nur por ne ĝeni iujn ritojn de la gastigantoj. Kiel mortulo sukcesas pri sia energi-interŝanĝo, mi ne scias. Ĉiukaze mi nun estas libera pri la barakto por pano. Tio estas financa avantaĝo ne troe laŭdebla. Mi ne sentas froston kaj varmo min ne atakas. Mi ne plu suferas pri maljustecoj kaj aliaj fantomoj enkapaj. Ĉiu sento en mi estingiĝis. Kaj tio estas bona tiel. Neŭrozoj min ne tiklas kaj mi ne devas ŝviti plu pro falsaj memtaksoj. Mi nun agas fantaste senemocie.

Mi denove enpenetris la japanan lingvon kaj progresis furore. Mia memorkapablo subite funkciis kiel aŭtomato.

Estas nature, ke miaj novaj kapabloj impresis la japanojn. Laŭorde mi nun trovis mian Suzuki - estas multaj tie - kaj tiu peris min al la Nippon-konzerno. Mi nun estas fame konata interpretisto. Miaj kolegoj nomas min kaŝe "maŝino", sed tio ne tuŝas min. Ili amuziĝas pri mia larĝa fruntbendo neniam demetata de mi. Flustre ili siblas envie : Jen li estas la usonano. Miaj konsiloj nun estas multekostaj, kaj denove mi servas al la scienco ! Mi skribis eseon kaj sendis ĝin al la kondutesploristo Yamamoto. Ĝi kaŭzis skandalon en lia instituto. la titolo estas : "Hipotezaj provoj pri kondutmanieroj post la morto". Yamamoto skribis al mi, ke li tre volonte akceptus min en sia loĝejo. Tio estas granda honoro en Japanio. Li skribis al mi, ke ŝokis lin mia klarvido en aĵoj, kiuj tute ne estas alireblaj por la sciencoj.

\*\*\*\*\*

S. SUK (Ĉinio) :

### MALAPERO DE LA MALRACIAJ MOROJ EN ĈINIO

Fatale la ĉina historio iradis tre malfeliĉe kun kelkaj tre-ege malraciaj moroj : piedetigo al virinoj ; poligamio, precipe posedo de la imperiestro al kelkcent eĉ mil belulinoj ; kaŝtrigo al la servoficistoj ; ktp.

Jen temas nur pri tiu piedetigo, la plej vaste kaj profunde influa. Tiu operacio fariĝis en ĉiuj familioj de la ĉefa nacio Han dum miloj da jaroj konforme al la kruela ĉin-ŝeŭdisma dogmaro. Ĝi tute rabis de inoj memstaran povon, eĉ senton esti homo, pli nenecese paroli pri ĉastperdo, kiu certe estis/as grava timindaĵo ĉe ĉinoj, sed ne nur pri la edzino, ja pri ĉiu virino de la familio. Ĉar mil jarojn antaŭe, la ĉastperdo estis jam rigardata pleja hontindegaĵo, do mortinda, ignore ĉu de memvolo aŭ de perfortiteco. Tial ne strange, ke multaj virinoj sin dronigis en puton aŭ riveron tuj post sia ĉastperdo, eĉ dum milita haoso - ankaŭ terura malraciaĵo! Pli veinde, unu tia kazo estis ankoraŭ okazinta, laŭ iu ĵurnalo, en lastaj jaroj. Jen mi revenu al la temo! Tiu piedetigo fariĝis tiel nature kaj do "racie", ke ĉiu knabino konscie toleris pli ol dekjaran suferadon kripligante kreskon de siaj piedoj per volvado tuj post sia ekkleriĝo anstataŭ duminfana devigiteco far sia patrino.

Kia absurdaĵo!... ne nur por eŭropanoj, ankaŭ por ni la modernaj geĉinoj. Tamen en la ĉina klasika literaturo tiaj tre etaj piedetoj estis laŭdataj kiel "oraj lotusoj" - nemankebla

elemento por esti belulino. Male, virino, kies piedoj vidiĝis naturdimensie, estis rekte kaj malestime krude nomata de oni "piedego" (kiaj estis ĉefe en naciminoritatoj kaj en tre dezertaj regionoj) kaj ŝi ne povis per edziniĝo eniri la familion de oficisto aŭ de inbtektulo.

Cutuse de tia temo, ekestiĝas doloro en mia animo : kiu naskiĝis ne de virino ? Kiu ĝuis seksemocion ne de virino ? Kiu familio povis ne naski idon inan ? Kaj por altranguloj kaj por kamparanoj ! Ho ve, tio estas fato, la FATO tiom kruela senkore kaj nemovebla senkarne, tiel same por niaj prahomoj kiel por ni vivantoj, tiel same por iu nacio kiel por iu persono.

Feliĉe, tiaj evidente videblaj malraciaĵoj estas tute forigitaj per du revolucioj : tiu de 1911 kaj tiu de 1949. Hodiaŭ restas ankoraŭ nur postsigno en multaj pli ol 60-jaraj virinoj, kies paŝadaspekto perfidas klare iliajn piedojn etigitajn troveble en dua vido. Rezone tiuj piedetulinaj nun aĝas almenaŭ 75 jarojn, la pli junaj el ili sendube estis piedetigitaj post la dekreta malpermeso de la registaro de 1911. Kontraste pli frue emancipiĝis la piedojn tiuj virinoj naskitaj en iuj urbegoj, kie eŭropa influo efikis frue, kaj tiuj naskitaj de tiaj familioj, en kiu ano estis ricevinta eŭropan edukon aŭ estis laborinta eksterlande. En iuj malproksimaj urbetoj, kie aero kvazaŭ neniam ventus kaj akvo neniam fluus, troveblas ĝis hodiaŭ, kvankam vere tre rare, piedetulinaj malpli ol 50-jaraj, kiujn adoltoj rigardas kun miro kaj geknaboj spektas kvazaŭ simion de akrobato, postsekvante distance. Evidente, post la leĝa malpermeso de la registaro de 1911, ne haltis tia ŝi-operacio por pliaj 30 jaroj. Tio kaŭziĝis ne nur pro obstineco de la tradicio, sed ĉefe pro senforteco de tiu registaro, kiu tuj post sia fondiĝo frontis spliton kaj perfidon de militaristoj. Estis alia aspekto por la registaro de la kompartio en 1949, kiu ekde sia fondiĝo senmole balais ĉian kontraŭaĵon. Nur tri jarojn poste, ĉiuj poligamio, prostituado, opifumado kaj vetludo malaperis, akompanante la severan ekstermadon far la komunista registaro al ĉiu rezisto kaj sennombraj oficistoj de la de ĝi venkita Kuomintang (nacia partio), kies sukcese retretinta forto moviĝis al Tajvan-insulo, dominante kaj prosperigante ĝin ĝis hodiaŭ.

Probable tiaj malraciaĵoj malaperus pli malfrue, se ne transatingintus la radio de la brila kulturo de Eŭropo, kiu evoluadas ekde sia pra-origino laŭ la plej racia kaj humanisma vojo en nia planedo. Ili ankaŭ forigintus tre malfacile, se ne estus tiaj sindonemaj revoluciuloj bone sorbintaj la racian nutraĵon de la eksterlandoj. Eĉ post starigo de nova socio,

nemankeblas paralelo de vasta kampanjo atentigi popolamason kaj puno al pluraj kontraŭgantoj.

Nepre venkos racio, ripetate kaj kredate de oni, tamen ne endas atendo por plia jarcento. Nunepoke en nia terglobo restas iuj terpecoj nepenetreblaj fortike sinumante sian ortodoksan malraciaĵon kaj obstine - pli ĝuste, stulte - rezistante heterodoksan raciaĵon, iam kaj ie tiel evidente kvazaŭ per  $1+4=2$  kontraŭ  $1+1=2$ .

Pro tia interna ksenofobio, suferantoj de ia ajn malraciaĵo estas nekompateblaj de aliaj bonkoruloj en nuntempa internacia principo neinterferi. Espereblas nur, ke tie aperu inteligentaj potenculoj, kiuj malraciaĵon malamas kaj kapablas ŝanĝi. La bonkoruloj en raciaj socioj povas deflanke ilin influi, prezentante superecon de la raciaj socioj. Tio estas ne tre malfacila dum ĉirkaŭ la globo flugas nebareble radiondoj. Vera obstaklo restas ankoraŭ lingva problemo, solvebla nun nek de Esperanto nek de angla lingvo.

\*\*\*\*\*

## MAKABRA DANCO

Jen ĉi tie la finiĝo  
De fiero, de vertiĝo,  
Jen ekvanas ĉia pen' ;  
Jen la veron de la homoj  
Ni proklamas, ni fantomoj,  
Jen ŝiriĝas la kurten'.

Kiu volis per konkero  
Reĝi sur la tuta tero,  
Adorate kvazaŭ di',  
Tiun kontraŭ eta vermo  
Ne gvardios ia skermo  
En la morta imperi'.

Kiu vivis en ĝuadoj,  
Marŝis nur sur floraj padoj,  
Nur pensante pri si mem,  
Tiu sur senlipa buŝo  
Sentas pason de la muŝo  
Zorga en la ova sem'.

Ho vivantoj, ho vivuloj,  
Vidu vin en la speguloj  
Prezentitaj antaŭ vi :  
Iam estis ni feliĉaj,  
Povaj, amegataj, riĉaj...  
Kio restas nun el ni ?

Venu. La makabra danco  
Vin atendas ; nula ŝanco  
savi sin el ĝia man'.  
Ĉiujare, ĉiu vundo  
Pligrandiĝas je profundo ;  
Ne revenos juna san'.

Kun la vento, la bløvanta,  
Vi forpasos, homo vanta,  
Kaj laŭ la komuna leĝ'  
Vi, prenite sen rezisto,  
Havos ne pli da ekzisto  
Ol la pasintjara neĝ'.

Bernard Aŭnis



# laŭtaj informoj kaj petoj



**REGIONA RENKONTIĜO DE LA ESPERANTISTOJ**  
el Sud-Okcidenta parto de Francio  
en NOGARO (Suda Ĝersio) la 10an kaj 11an de Majo 1986.

NOGARO situas je 70 km norde de Pau, 150 km sude de Bordeaux, 150 km okcidente de Toulouse kaj 80 km sudokcidente de Agen en pitoreska parto de suda Ĝersio. Tie ni disponos pri du vastaj salonoj en la Urbodomo. Eblis tranokti en hotelo aŭ tendumi, pikniki aŭ manĝi en restoracio.

Jen la prezoj : 2-persona hotelĉambro 85 FF  
la sama kun malgranda lito 110 FF  
Komuna dimanĉa tagmanĝo en restoracio 70 FF  
(vino inkluzivita)

## Antaŭvidata programo

Sabaton 10an de majo : ekde la 14a kaj 1/2 : akceptado de la partoprenantoj en la urbodomo ; ekspozicio pri Esperanto ; laŭeble, propagandkunveno.

\* je la 20a kaj 1/2 post vespermanĝo : Prezento de lumbildoj kun komentoj esperant- kaj franclingvaj pri la ĵus okazinta 58a Kongreso de SAT en Amersfoort (Nederlando). Sekvos debato.

Dimanĉon 11an : 9a kaj 1/2 : Libroservo. 10a kaj 1/2 : Ĝenerala Kunveno : ĉiu grupo respondos pri sia agado. Tagmanĝo.

Posttagmeze : mallonga prelego, skeĉoj, kantoj, rakontoj, muziko, k.a.... Kiuj deziras ion prezenti, tuj sin anoncu (plej malfrue dimanĉon la 11an en la mateno).

Je la 17a kaj 1/2 : disiĝo.

**Sinanonco estas nepre necesa por faciligi taskojn de la organizantoj.** Tiucele bonvolu plenigi aŭ kopii jenan informilon :

**NOMO, antaŭnomo kaj adreso :**

Tiu ĉi aliĝo validas por .... personoj. Mi/ni alvenos : sabate/dimanĉe matene.

Mi/ni rezervigas ĉambron en hotelo : jes/ne (kiom da? ....).

Vespermanĝo en restoracio sabate : jes/ne (kiom da : ....). Komuna tagmanĝo dimanĉe : jes/ne (kiom da : ....). Mi/ni tendumos (senpage) : jes/ne.

**Sendu la informilon antaŭ la 8a de majo al :** Henri CHAIRE, 10 rue du Printemps 33530 BASSENS. Tel: en Bassens : 56 06 06 49 (ĝis la 7a de majo). En Nogaro : 62 69 02 48 (ekde la 8a de majo). Ni atendas vin multnombraj :

I.K.T.S.

**La INTERNACIA KULTURA kaj TURISMA SEMAJNO** okazos en PAU (Paŭo), en sudokcidenta Francio, de mardo 22a de julio (alventago) ekde la 9a, ĝis mardo 29a de julio 1986 je la 9a (forirtago). Prezo inter 1400 kaj 2200 frankoj, laŭ aĝo (25 j.) kaj aliĝdato. Enestas : 7 plenaj tagoj (ĉambro, manĝoj), 6 ekskursoj kaj urbvizitoj, muzeoj, kulturaj aranĝoj. Tuj petu plenajn informojn (kontraŭ 2 resp.kup.) al ESPERANTO-PAU-ADOUR, C.S. Pépinière, av. R. Schumann, F 64000 PAU

## KONFERENCO DE N.E.M. en ATENO

La Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado okazos en Ateno, la ĉefurbo de la Eŭropa civilizacio, de la 26a de julio ĝis la 2a de aŭgusto 1986. La ĉeftemo estas "Paco kaj Libereco". Kompetentaj lekciistoj pritraktos ĝin el filozofia, etika, historia, politika, ekologia kaj jura vidpunktoj. Okazos ankaŭ ĉefkunvenoj de ICNEM, Internacia E-Asocio de Juristoj, Filozofia Asocio Tutmonda, la 2a Internacia Forumo de la Monda Federacio de Kulturaj Asocioj, verŝajne aliaj kunvenoj kaj debatoj. Krome : interkona vespero, bankedo kun balo, vizito al vidindaĵoj de Ateno, tuttaga ekskurso al la regiono Korinto-Epidaŭro-Mikeno-Hefpliono, postkonferencaj ekskursoj.

La konferencejo - la unuaranga Esperia Palachotelo - estas klimatizita. Baza aliĝkotizo : 4000 drakmoj ĝis 31.03.86, kaj 4800 drakmoj post tiu dato. Aliĝojn akceptas kaj ĉiujn pliajn informojn donas la LKK je la konstanta adreso : S-ino Adda Sakelaropoulou, Aghias Paraskevis 30, Ateno-816, Grekio.

## ĈIULANDAJ PACPROPAGANDILOJ SERĈATAJ

Samarkanda Esperanto-klubo de Interpopola Amikeco daŭre kolektas ĉiulandajn kaj ĉiulingvajn porpacajn plakatojn, flugfoliojn, fotojn, (infan)desegnaĵojn, leterojn pri paco, librojn, revuojn, ĵurnalojn, lumbildojn, insignojn, gluafiŝetojn, poŝtmarkojn, ĉiujn ceterajn pacpropagandilojn. La materialoj estas serĉataj por la jam tradiciaj internaciaj porpacaj ekspozicioj kaj por fondota Muzeo de Paco. Bonvolu adresi ĉion al :

International Friendship Club "Esperanto", P.O.Box 76, 703000 SAMARKAND Uzbekistan, U.S.S.R.

Tiuteme oni korespondas en Esperanto, angla, rusa, laŭbezone ankaŭ en aliaj lingvoj. Respondo kaj laŭdezira rekompenco garantiataj : Validas ĉiam. Represo kaj nacilingvaj anonctradukoj petataj. Anticipajn dankojn al ĉiuj kontribuontoj !

**Korespondi deziras** : Mónica MARSCHALKÓ, Áttalános Iskola, H 3067 Mátaszöllős, Hungario. Ŝi estas E-komencanto. Ŝatokupoj : muziko, vojaĝoj, literaturo. Ŝi estas studentino por fariĝi vartistino por infanĝardeno.

**En MONTAUBAN** (Sudokcidenta Francio) okazas E-kursoj : En "Le Foyer de Villebourbon" (Kulturdomo), unuagrada kurso (4 gelearnantoj), duagrada (1 lernantino). En la "Universitato de la Tria aĝo" : 3 geleŝantoj. Hejme : triagrada kurso : 2 lernantoj. Kiam eblas, de tempo al tempo ni organizas komunan amikan renkonton de ĉiuj. Por ĉiuj informoj sin turni al : Nicole Déjean, 14 rue A. France, F 82000 MONTAUBAN

La E-grupo en Eysines (Girondio) komunikas : De la 30a de junio ĝis la 6a de julio 1986 : **ESPERANTO-PIEDMIGRADO** en Trescleoux (apud Sisteron (Hautes-Alpes), FRANCIO (fervoja linio : Marseille-Grenoble).

Ekde la etapkuŝejo de Trescleoux ni piedmigrados stelvoje tra "Serrois" kaj "Veynois"-regionoj (mezalta montaro). Ĉi tiu piedmigrado sin turnas al E-istoj kaj ankaŭ al neesp-istoj, kiuj okaze de tiuj plezuraj marŝadoj "iniciĝos" pri Esperanto. Ni vizitos la malnovan urbon de Sisteron kaj ĝian citadelon. La vesperaj aranĝoj estos organizitaj de la partoprenantoj. La etapkuŝejo kuŝas ĉe piedo de monto Garde for de la bruoj de la ĉefaj vojoj, borde de rivereto "Blaisance". Ĝi situas ĉe alpa vojeto n°66.

Plena gasto-prezo : 130 FF ĉiutage. Aliĝo : 30 FF.

Por pli da informoj kaj por aliĝi skribu al : Ginette Gabillon, 32 rue Renault F 33200 BORDEAUX CAUDERAN, Francio.

### PALESTINO \* SOLIDARECO

Jen eltiroj de letero ricevita de Martine kaj Michel, anoj de A.M.F.P. (Franca-Palestina Medicina Asocio) :

"Ni estas subtenantoj de palestinaj infanoj. Antaŭ kelkaj monatoj ni forvojaĝis al okupata Palestino (Cisjordanio). Eblis al ni viziti la familion, kiun vi helpas. ... Antaŭ 3 aŭ 4 monatoj la patro estis liberigita okaze de interŝanĝo de 1500 palestinaj malliberuloj kontraŭ la 6 israelaj soldatoj. Tre afable ili akceptis nin. Ili ankoraŭ estis emociitaj kaj ĝojplenaj pro la neatendita liberigo de la patro. La israelaj aŭtoritatoj senĉese kontrolas lin kaj timigas lin por forpeli lin el lia hejmo, trudante la regionajn laboronantojn, por ke ili ne dungu lin. Sed la tuta familio firme decidis resti en Qiralquilia (apud Naplouse)."

Ne nur en Palestinaj teritorioj okupataj de Israelo, sed ankaŭ en Libano, la Palestinanoj en la tendejoj suferas kontrolojn kaj subpremadojn fare de Kristanoj kaj Sijaistoj. A.M.F.P. organizas helpon al palestinaj infanoj en la okupataj teritorioj en Israelo (pr. 250 infanoj) kaj nun en Bejruto (15 infanoj). Temas pri infanoj, kies patro estas malliberigita aŭ mortis pro milito aŭ pro rezisto. Infanpatronado alportas materialan kaj moralan helpon. La subtenantoj ricevas dosieron entenantan la foton de la infano. Povas okazi rektaj rilatoj kun la familio (korespondado, donacoj, vizitoj). Patronadi infanojn de Palestino, kiuj travivas krueleajn afliktojn, estas konkreta humana ago. Por pli da informoj, vi povas kontakti : A.M.F.P., 14 rue de Nanteuil, 75015 PARIS.

Ginette G.

## Ĉu Sataj Faŭkoj ?



Bulteno de la SAT-Junulfakanoj  
Esprimilo por ĉiuj. Redaktas : Marcel Redoulez, 8 rue Colette,  
F - 33150 CENON (Francio)

\*\*\*\*\*

kuŝi en akvo, ĝui la sunon,  
lasi la zorgojn forflui...



### NI HELPU INFANOJN EL NIGERIO LERNI ESPERANTON

Kadre de sia helpo al la Tria mondo, SAT-JF interrilatas kun la "E-lernejo de EKPOMA" en Illeh (Nigerio). Jam plurfoje la infanoj de tiu lernejo sendis al ni desegnojn, nekontestebajn infanartaĵojn. Ni sendis materialojn : paperon, skribilojn, kraĵonojn, farbojn, skrapgumojn... Nun ni kolektas E-lernolibrojn (Junulkursojn aŭ anglalingvajn) kaj infanlibrojn en E-o por ili. Antaŭajn dankojn al ĉiuj donantoj. Sendu viajn librojn al la ĉi-supra adreso.



## ĈU SATAJ FAŬKOJ ?

Laŭ la eksterordinara sondado proponita al ĉiuj SAT-JF-anoj en 1984, gejunuloj deziras, bezonas propran bultenon. En 1985 okaze de komitato-kunveno mi ne tro malfacile konvinkas min "redakti" tiun necesajon. Singardaj ni devas resti. Ni konas la malfacilaĵojn de Owen, Bruno kaj Francis, la sinsekvaj redaktoroj de la "junaj voĉoj" en *Sennaciulo*. Pro tio ni decidis eldoni unu numeron jare komence, kaj ne precize fiksas la daton de la unua aperigo : komence de 1986...

Finfine jen ĝi ! jen "ĉu sataj faŭkoj?" ! Libera esprimilo por ĉiuj, ĝia fundamenta "principo" estas : aperigo de ĉiuj ricevitajĵoj! ĉiuj! Ĝi estu verko de gejunuloj (almenaŭ laŭ la spirito) por gejunuloj. Ni ne timu malplaĉi, ŝoki, (ĉu eĉ provoki?) aliajn legontojn. Mi ne sentas ian tian ĝenon ĉe la verkintoj partoprenantaj tiun unuan bultenon, kaj tio plaĉas al mi. Ilin ĉiujn mi ŝatus danki kaj gratuli. Sendi artikolon aŭ verkaĵon por bulteno, kies aspekton oni ne povas eĉ diveni, postulas bravecon. Estas ĉiam aventuro, kiu povas liveri malbonajn surprizojn. Mi almenaŭ esperas, ke ili ne sentos sin trompataj aŭ elrevigataj, trovante tiun kelkpaĝaron en sia leterkesto. Certe ili unue sendos siajn kritikojn aŭ novajn kontribuojn por la dua bulteno. Kaj ju pli da kritikoj mi ricevos, des pli da plibonigoj mi povos aranĝi. Ekde nun ni devas pensi pri tiu dua numero, kiu aperos komence de 1987. Aŭ ĉu pli frue ? Tio dependos de la materialo, kiun vi sendos dum la venontaj numeroj. Ni planas almenaŭ du numerojn venontan jaron. (Ĉu marto kaj septembro ?) Kion vi ŝatus legi ?... Skribu !

Marcelo

\*\*\*\*\*

Kien ci kuras,  
Arturo ?

Mi volas vidi EJEAn !

Ĉu novan belulinon? Atendu min !

Malkovru EJEAn (pr. Eĥea) okaze de la  
**Tria Internacia Junulara Renkontiĝo**

De la 27a de julio ĝis la 2a de aŭgusto '86  
venu en la provincon de ZARAGOZA en  
Hispanio ! Ĉiujn detalojn petu de :

José Antonio FLETA, S. Teresa 20-7

E - 50006 ZARAGOZA



**EKSKLUZIVE :** La plej maljuna JF-ano, kiu ĉeestis sur la Predik-  
monto, raportas kaj malmistikas la Miraklon de la malsato.

Iun tagon, kiam Jesuo sidis kun siaj disĉiploj apud monto kaj predikis, rakontis fabelojn kaj pripensigajn historietojn, alvenis en la daŭro de kelkaj horoj pli ol kvin mil personoj, viroj, virinoj kaj geknaboj el apudaj vilaĝoj por aŭskulti lin. Sed post kelkaj horoj da aŭskultado la homoj ne plu estis tiel silentaj kaj atentemaj kiel ĉe l'komenco. La geknaboj petolis kaj ludis, kaj multaj el la pliaĝaj pensis pri manĝaĵo kaj precipe pri trinkaĵoj, ĉar la suno brilis tre varme. Kelkaj, kiuj estis portintaj de hejme iun manĝaĵon, malfermis siajn sakojn aŭ demetis tukojn de la korboj. Ili komencis manĝi kaj trinki.

Sed estis ankaŭ multaj, kiuj tuj post ekscio, ke tiu Jesuo ĉeestas, forlasis siajn hejmon kaj laboron sen kunporti ion. Komenciĝis malkvieto, multaj diris "ŝŝŝ!", sed la malsatuloj tamen ĝenis la aŭskultantojn kaj elpakis panon, fiŝojn, botelojn da vino aŭ akvo. Kaj ĉiam denove oni vidis avidajn rigardojn de tiuj, kiuj estis sen manĝaĵo.

Nun ankaŭ la disĉiploj de Jesuo petis, ke oni estu silenta, aŭ oni ne plu komprenus la vortojn de la Majstro. Dum longa tempo Jesuo ne rimarkis tion, sed kiam la malkvieto plifortiĝis, li demandis pri la kaŭzo. "Ho, Majstro, diris unu el la disĉiploj, la homoj estas malsataj kaj ili soifas. Kelkaj ekmanĝis, sed multaj jam foriris, ĉar ili havis nenion por manĝi. Vidu jen! Ili iras hejmen." Jesuo diris : "Do, donu al ĉiu ion por manĝi kaj trinki. Ni ja havas." "Sed ni havas preskaŭ nenion", la disĉiploj lamentis, "ni havas ion por manĝi nur por nia grupo" "Kaj la aliaj homoj?" "Nu, diris Petro, tie ĉi estas knabo, kiu havas en sia sako kvin panojn kaj du fiŝojn, sed li volas reteni ĉion por si mem." Jesuo pripensis momenton, tiam li diris al la dekdu disĉiploj : "Iru kaj zorgu, ke la tuta amaso de homoj kunsidu en grupoj de ĉirkaŭ cent personoj. Tiam mi iros de grupo al grupo, kaj ili devos meti ĉion manĝeblan kaj trinkeblan en la mezon. Mi asertas, ke tiam ĉiu povos satiĝi. Estas nur demando de interhelpo kaj divido!" Ili faris tiel. Ĉe la plej multaj la bona ekzemplo de prudentaj homoj konvinkis la posedantojn. Nur ĉe malmultaj Jesuo devis severe admoni aŭ eĉ riproĉi, ke ili ne estu tiel egoistaj. Kiam post duona horo ili ĉiuj estis sataj, eĉ restis ankoraŭ paneroj, kiujn oni kolektis en korboj. Je la fino estis ses plenaj korboj, kiujn oni en la vespero portis al la malsanuloj en la vilaĝo, kie Jesuo kaj la disĉiploj tranoktis. Jesuo rigardis ĉielen kun lumantaj okuloj. Li tiel ĝojis, ke eĉ larmoj venis al liaj okuloj. Sed ĉiuj homoj laŭdis la prudenton de Jesuo kaj diris : "Li ne nur estas homo!"

Fredo



P.S. : Jesuo tiam vere pepadis multon. Lia milda voĉo ĉarmis kaj lulis, tiel ke mi ekdormis antaŭ la fino de la spektaklo. Nur du eldirojn liajn mi ankoraŭ hodiaŭ povas parkerumi (vi certe pardonos mian maljunan memoron!) :

"Feliĉaj estas la malriĉaj en spirito, ĉar ilia estas la regno de la ĉielo. Kaj feliĉaj estas la kokritoj, ĉar ili senpage kuŝas kun putino."

\*\*\*\*\*

Saluton al ĉiuj !

Mi sendas al vi malgrandan akrostikon, kiu rilatas al nenio, ŝajnas. Sed "verko" (ŭa! ha!ha!) ne bezonas esti komprenata de la aliaj, ĉu eĉ de la skribanto mem?, nur sentata.

Ĝi kompreneble estas ne tiom lerte verkita, sed eble povas esti uzata de vi.

Se ne, ŝetu en rubujon : povas esti, ke mi ĝin rekolektos poste...

Plej amike... Jen tiu aĵo dormema, se ne dornema ----

## AŬTUNO

Kial videbliĝas ne nur unu kolor' ?  
Anstataŭ la flava, tiu de la suno  
Ŝatata de l' papo kaj pastroj pro la or'  
Tiom pli varmas la kaŝtana, la bruno.

Anstataŭ la ruĝa, himno al la pasi'  
Ni unuanime, ĉiuj, ĉiam, ĉiel  
Kontraŭstaru. Estas facile : nur lasi  
Ondi de plandumoj niaj ĝis la ĉiel'

La kaŝtankoloron. Kaj belos ĉiu ras'.  
Oh! stop! fantaziul', ĉar ne eblas laŭ vic'  
Refari la mondon tia, eĉ ne indas,  
Aŭ ne renkontiĝus de ĉi-kolor' komplic'.

Jean-Luc Bergeon

\*\*\*\*\*  
**SAT-Junulfako kaj JEFO invitas vin  
ĉe la Monto Sankta Mikaelo (Normandio, Francio)**

de la 7a ĝis la 11a de Majo '86

Informas : Claude ROUGET

Ecole Louise Laurent

F - 14400 Bayeux

Ekzistas du aferoj senfinaj : la universo kaj la homa stulteco. Sed pri la universo ankoraŭ ne certas.

Albert EINSTEIN

## PLIJUNIGI LA SAT-MOVADON !

Baldaŭ, en 1987, Esperanto iĝos centjara. Ĝi ne estas longa tempo en la vivo de lingvo. Sed se ni rigardas el la vidpunkto de artefaritaj lingvoj, tiam ni povas konstati, ke ESPERANTO pruvis sian vivkapablon kaj bonege plenumas la rolon de moderna internacia lingvo.

En la estonto ni geesperantistoj devos klopodi, ke Esperanto efektive iĝu la vera helplingvo de la homaro.

Laŭ mi, en la internacia laborista movado, Esperanto povus plenumi pli gravan rolon, ol nun. En la venontaj jardekoj estos pli grava la kunlaboro de la tutmonda laboristaro. Tial Esperanto estus dezirinda kaj taŭga helplingvo, per kiu la diverslingvaj laboristoj komprenos unu la alian.

Mi estas optimista kaj kuraĝas aserti, ke SAT reakiros sian malnovan potencon kaj ĝi estos la ĉeforgano de la esperantista laborista movado. Helpe de Esperanto falos lingvaj bariloj.

Por ke SAT denove estu forta kaj povu doni realan helpon al la laboristaro, ni nepre devas rejunigi ĝin.

Inter la vicoj de SAT-anoj estas preskaŭ nur maljunuloj. Ŝajne SAT jam estas la organo de pensiulaj laboristoj, ĉar mankas gejunuloj.

Mi ne volas flankenŝovi la maljunajn SAT-anojn, ĉar ankaŭ en la estonto ni bezonos ilian persistan laboron kaj longjarajn spertojn en la internacia laborista movado. Sed ankaŭ ili devas konsenti, ke la membraro de SAT tre maljuniĝis. Dum SAT-kongresoj oni vidas preskaŭ nur "oldulojn".

SAT estas disvastiĝinta ĉefe en Okcidenta Eŭropo. Tial estus laŭinde, se en la sekvaj jaroj ankaŭ el la aliaj partoj de la mondo aliĝus junaj esperantistaj laboristoj.

SAT devus serĉi kontakton ankaŭ kun la juna laboristaro de Orient-Eŭropaj landoj. En tiuj ĉi landoj vivas multaj, precipe junaj geesperantistoj, tamen nur malmultaj konas ion pri SAT. En tiuj ĉi landoj mankas propagando. Mi scias : la disvastiĝon de SAT en Orienta Eŭropo malhelpas kaj malebligas multaj politikaj kaj ekonomiaj malfacilaĵoj.

La gvidantoj de SAT devus esplori, ĉu ili faris ĉion eblan, por ke SAT povu disvastiĝi en Orienta Eŭropo.

Mi proponas al SAT-junulfako, ke ĝi provu fari kian ajn kontakton kun diverslandaj asocioj, precipe en Orienta Eŭropo. Tiaj kontaktoj povus esti fruktodonaj kaj rezultaj ambaŭflanke.

Se SAT estus permesita oficiale en Orienta Eŭropo, tiam nia laborista movado denove estus brila punkto de la horizonto de Esperanto.

Ni ne forgesu la Trian Mondon ! En la landoj de Tria Mondo plej multa estas la nombro de gejunuloj kaj ili estas pleje ekspluatataj de kapitalismo. El inter ili multaj ne scias legi, skribi, dum ilian lingvon kaj kulturon subpremas la lingvo kaj kulturo de la iamaj koloniistoj.

En la Tria Mondo estus tre bezonate disvastigi Esperanton kaj samtempe la ideojn de SAT.

Mi esperas, ke SAT povos efektiviĝi tiujn ĉi taskojn kaj en la sekvaj jaroj ni spertos rapidan plijuniĝon kaj refreŝiĝon.

### "MONDANO"

## KIA ESTONTECO POR LA JUNULARO ?

Ŝajnas, ke la plimulton ne interesas tiu problemo. Ĉu tial, ke por ili ne ekzistas elir-vojo el la nuna situacio ? Nun la diversaj tendencoj de la laborista movado finatingas rezultatojn malkuraĝigajn por la amaso. La rusa revolucio naskis grandan esperon pri laborista povo. La efektivigo estis nur la povo por unu partio kaj interne de la partio nur unu kasto, eĉ nur unu homo. La soveta socialisma reĝimo estas nur diktatora reĝimo kaj tute ne vere soveta socialista. Temas ne pri komunismo, sed nur pri aŭtoritata ŝtatkapitalismo. Se oni konfuzas ĝin kun komunismo, oni same malamas.

Bedaŭrinde, ĉie, kie la socialreformistoj atingis la povon, ili nur mastrumis laŭ la kapitalista maniero. Fatale ili ne povis solvi la krizon. Ili ankaŭ estas pli naciistaj ol la burĝaj partioj kaj faris/as ruinigajn militajn aŭ prestiĝajn elspezojn. Ĉio tio malkuraĝigas la konsciajn laboristojn kaj ni povus eĉ timi, ke la malkleraj aŭskultus kaj sekvus la demagogajn ekstremajn dekstrulojn.

Laŭ mi, necesas trovi alian vojon por finatingi socialismon. Por tio la Lanti-aj ideoj povas bone helpi. Ankaŭ en movadoj kiel abundistoj, ekologiistoj, mondcivitanoj, anarkiistoj, ni povas trovi bonajn instruojn. Eble la teorioj de Lanti estis tro absolutaj, malgraŭ ke li diris sin neabsolutisto. Sed la ĝenerala ideo estas bona gvida principo, kaj la finatinginda celo, la necesa kondiĉo por unuigonta mondo, sen milito, sen ekspluatado de la homo fare de la homo.

Li emfazis la gravecon de la komunikada kaj lingva problemo, do la neceson elekti komunan lingvon kaj devige lerni

kaj uzi ĝin en la tuta mondo. Li montris la taŭgecon de Esperanto. Pri tiu punkto ni povas diri, ke se ni deziras evolui al pli racia sociordo, necesas sin devigi al propra peno. Due, eliri el la egoismaj, malmoralaj naciismoj kaj pensi kiel mondcivitanoj, starigi novan socian organizon cele al tutmonda unuigo, sed ankaŭ en nova socia strukturo sen ekspluatantoj kaj ekspluatatoj.

Trie, li malfidis la profesiajn politikistojn, eĉ la laboristajn gvidantojn, kiuj akiris bonan oficon.

Kvare, li insistis pri la neceso respekti moralajn leĝojn kaj devojn, pri respekto de promeso libere konsentita, de akurata plenumo de la promesitaj taskoj.

Li komprenis la necesan batalon de la laborista klaso por ĝiaj vivkondiĉoj, sed ankaŭ la neceson trovi bonajn solvojn por anstataŭigi la kadukan kapitalismon en fina krizo. Ĉio tio ŝajnas valora por mi. La motivoj de Lanti estis lia malamo kontraŭ la milito, la malefikeco de la internaciaj organizoj por malpermesi tiun de 1914-18. Li kuraĝe kaj akurate laboris por progresigi la laboristan kaj esperantan movadon malgraŭ la klarvido, ke liaj agoj ne donus al li grandan rekompencan. Li atentigis la laboristojn, ke por atingi socialisman socion, ili devus ne nur depostuli, sed ankaŭ instruiĝi, preni respondecajn taskojn, kaj ilin serioze honeste plenumi. Interalie, li komprenis kian grandan rolon povus plenumi esperanto, ĉar ĝi estas pli facile lernebla ol kiu ajn alia lingvo por la laboristoj kaj ebligus senperajn rilatojn kun alilandaj laboristoj. Estus bone, ke ili komprenu, ke ili mem zorgu pri sia sorto. Jam Marks diris en la fama Manifesto "la emancipiĝo de la laboristoj rezultos de la agado de la laboristoj mem". Kaj en la kanto "Internacio" troviĝas : "Liberon donos al popolo nur ĝia propra forta mano".

Certe, la sorto de la laboristoj estas ne tiel aĉa kiel en la pasinteco, ankoraŭ malpli por la teknikistoj aŭ superaj mastrumantoj. Multaj el ili zorgas nur pri sia bonstato sen solidaro kun la ceteraj laboristoj. Tamen ilia sorto dependas de la sorto de ĉiuj. Ankaŭ ili havas intereson en alveno de mondo sen milito, sen mallaboreco. Ankaŭ la kamparanoj, metiistoj, etkomercistoj... Ĉiuj devus kompreni la necesan partoprenon por elpensi novan socian strukturon kaj ĝin efektiviĝi.

La ĉefa verko de Lanti estas la **Manifesto de la Sennaciistoj**. La eldonantoj (Sennaciista Frakcio) diris en la enkonduko : "...tiuj tezoj bone asimilitaj kaj inteligente prezent-

itaj de SAT-anoj devas veki intereson de kulturitaj homoj ne ankoraŭ esperantistoj" kaj Lanti : "Ni sentime elpaŝas kun nia **Manifesto** en la arenon de la ideologia batalo" (en januaro 1931). Laŭ mi, tiu manifesto respondis al demandoj :

1) Kial la laborista movado estis ne kapabla pli efike agi sur la internacia skalo ?

2) Kiu pli bona sinteno por efike agi kontraŭ la milito?

3) Laŭ kiuj principoj gvidi siajn agojn ?

Li diris la neceson elekti socian kaj ekonomian sistemon de planeda mastrumado.

Iel ĝi estis nova ismo kaj malgraŭ, ke la aŭtoro ne ŝatis gvidistecon, li konsilis gvidan linion. Estus pli bone, laŭ mi, se oni dirus tion. La laboristaro ne plu fidis al tradiciaj partioj. Do la manko de esperigaj perspektivoj kaj celoj malkuraĝigas ĝin kaj favoras la disvolviĝon de ĉiuj reakciaj movadoj. Tamen ŝajnas al mi necese precizigi, ke la sennacisistoj celas al tutmonda regno, sed nur por starigi demokrate internaciajn leĝojn, regularojn komunajn por ĉiuj popoloj, ebligantajn pacan kunekzistadon kaj demokratian socialisme planitan ekonomion tutmondan kun la celo kiel eble plej uzi la naturajn riĉaĵojn, evitante malŝparaĵojn, respektante ekologion, por pli da solidaro, malpliigi la diferencojn.

La malamikeco de Lanti kontraŭ la naciismo ne estas malamikeco kontraŭ la popoloj. Ĝi estas malamikeco kontraŭ egoisma naciismo, kiu volas superi ĉiujn aliajn, kiu estas rasismo. Sed, laŭ mi, oni ne devas esti kontraŭ naciismo, se temas pri unueca solidaro de homgrupo, de kolektivo. La internacia regado devus koncerni ĉion rilate ordigon, interhelpon, faciligon de la interŝanĝoj, sed ĉiu lando daŭrigus la memadministradon de ĉiuj internaj aferoj en daŭre granda libero. Ĉiuj havus samajn devojn kaj samajn rajtojn. Necesus precizigi tiun punkton, se oni ne volas esti juĝata kiel imperiisto.

En aldono al la **Manifesto** (Postulatoj sociologiaj) Lanti diris: "Nova socio racia ne povas stariĝi mirakle el la kaoso. Necesas jam laŭcela pionirado de la homoj, kiuj akiras klaran komprenon pri la realaj kaŭzoj de milito kaj socia malordo kaj plie kapablaj anticipi. Tiaj anticipuloj devas organiziĝi, grupiĝi kun la celo konsistigi dinamikan forton, kiu kapablos benefiki sur la statikan amason, kiu sopiregos savon de la kaoso, kiam tiu estos atinginta sian apogeon. La formiĝo kaj organiziĝo de malplimulto el dinamikuloj povas okazi nur per la praktikado de esperanto kun homoj el ĉiuj mondpartoj, kaj la aneco en

sennacieca organizo. La dinamikuloj ja devas esti kapablaj anticipi ne nur ideo sed ankaŭ sente.

Unuvorte kaj konklude, necesas kreiĝo de la patriotismo planeda."

Laŭ mi, necesas ne nur diskonigi tiujn ideojn en la esperantaj medioj, sed ankaŭ en la tuta socio. Estus bone por la SAT-anoj, kiuj ne konas la verkon de Lanti, ke ili ĝin legu.

NDLR. La aŭtoro de la ĉi-supra artikolo asertas, ke li estas maljuna. **JOPO** Ĉu pro tio ne indas publikigi ĝin en nia JF-bulteno ? La leginto juĝu mem !



## JUNULOJ KAJ MILITO

*Dum la jarcentoj ĉiam pleje suferis la junuloj pro la militoj. Ili estis tiuj, kiuj batalis plej ofte sur la batalejoj. Generaloj kaj militestroj ilin povis pleje trompi pri la graveco de la milito.*

*La junuloj ŝatas fieradi pri la forto kaj lerteco. La milito ĉiam estas bonega okazo por fanfaroni. Tion ĉi ekspluatas ruze la generaloj kaj militestroj.*

*Plej ofte la militoj erupcias pro stultaj kaj bagatelaj aferoj. Kelkaj grandpotenculoj fabrikas ideologion kaj instigas la popolon por realigi ĝin.*

*La junuloj estas tiuj, kiuj plej unue ekprenas la armilon kaj sekvas blinde la ordonojn de "oldaj" militestroj, kiuj promesas al ili gloran venkon kaj grandan karieron. Ili diradas, ke iliaj "sanktaj" armiloj superas la malamikon kaj la patrujo bezonas la heroecon de junularo. Ili devas ekpreni armilon kaj*



ĝis la lasta sangoguto defendi la patrolandon. Iam alvenos la "glora" tago, kiam la heroaj soldatoj venkos kaj la estonto benos ilian nomon.

Sed la militestroj forgesas paroli pri morto kaj doloraj vundoj, kiuj atendas la soldaton sur la batalkampoj. Ili ne mencias la malĝojon de la patrinoj kaj edzinoj pro la morto de ilia karulo.

Komence ĉio brilas kaj la milito ŝajnas nur "granda" aventuro, kiu finiĝos agrable post kelkaj tagoj. Nur sur la batalkampoj oni rekonscias, ke la milita vivo ne estas tiel ĉiela, kiel la generaloj kaj militestroj asertis. La malamiko kutimas repafi kaj la pafilkugloj kaj grenadoj trafas ankaŭ ilin. Post la morto, kiom valoras la "brila gloro" ?

Sed jam ne estas rifuĝejo, ĉar tion la soldata leĝo severe malpermesas. Kiu forĵetas la armilon, tiun la milita tribunalo mortpunas.

Kial devigi iun morti ? Kaj entute kial ekzistas milito?

Ni restu nur en nia jarcento, ĉar tiu ĉi superas la antaŭajn. Dum la unua mondmilito mortis milionoj da homoj (precipe junuloj 18-35-jaraj). La diversnaciaj soldatoj ne konis unu la alian, tamen ĉiutage fluis la sango. Poste baldaŭ en la dua mondmilito mortis pli multe da homoj. Kial paroli pri ĝi detale, ja ĉiu homo scias la okazintaĵojn. Kiom multe da junuloj mortis sur batalkampoj ambaŭflanke ? Plej multaj ne sciis la kialon de sia morto.

Sed ni ne kredu, ke niaj jardekoj estas senmilitaj. Ankaŭ nun ĉiutage en la mondo furiozas militoj. Ni ne forgesu kiom multe da junaj homoj mortis en Koreio kaj Vjetnamio. Kaj nun : Irako, Irano, Afganio, Libanio, Nikaragvo, ktp. Tie la "saĝaj" militestroj kaj generaloj pelas tute junajn homojn. eĉ knabojn por la "sanktaj celoj", por kiuj morti estas privilegio kaj la mortanto tuj flugas en la ĉielon aŭ iĝas juna heroo de la ideo.

Mi ne volas akuzi la junulojn, ja ankaŭ mi mem estas ankoraŭ juna kaj konas malmultajn eblecojn kontraŭstari la ordonojn de militestroj kaj la publikan opinion. Tamen mi konvinkigis, ke ni kapablas haltigi la militon, se la tutmonda junularo kune dirus : NE!

Ni ne forgesu : la nunaj modernaj nukleaj armiloj superas ĉiun ĝis nun ekzistantan. Ne ni junuloj estu tiuj, kiuj pereigos la terglobon ! Laŭ mi, la tasko de la gejunuloj estas naski novan vivon. Gejunuloj ne aŭskultu la mensogan parolon de la "oldaj" militestroj kaj generaloj !

Ni vivu en paco unu kun la alia ! En nia mano estas la sorto de Tero kaj nia estonto.

MONDANO

## POR KIO TAŬGAS ARMESERVO ?

Okaze de la pasintjara lotado pri la lokoj, kie devos arme-servi multaj hispanaj junuloj, la revuo **Cambio 16** komisiis al enketentreveno sondadon por koni la opinion de la hispanoj rilate la armeservon.

Ties rezulto estas sufiĉe memklara : 70 % el la hispanoj opinias, ke la armeistoj profitas por si mem de la soldatoj ; 60 %, ke la armeservo estas malprofitdona. La soldatoj opinias eĉ pli malbone pri tiu servo : 83 % el ili dubas pri ĝia utileco, ĉar, laŭ la plimulto, ĝin farante, "oni lernas malagi" kaj "oni akiras malvirtaĵojn".

Malgraŭ ĉi tio dirita, la hispanoj ne estas akre kontraŭ-armeaj, ĉar fakte 47 % el ili opinias la armeservon bona por la junuloj (kontraŭ 28 % opiniantaj male) ; oni kontraŭstaras la metodon, la kondiĉojn ; oni volas modernigi la armeservon, kies nuna stato ne taŭgas por la nacia defendo, ĉar la soldatoj eĉ ne ellernas uzi la fusilojn. Tio estas la fakto : la armeo ne scias, kion fari kun la rekrutoj ; tiel la tempo por fari nenion estas troa, kaj kiel rezulto aperas enuo kaj malfeliĉo, kiuj inklinigas la soldatojn al la toksaĵoj (ĉefe al la alkoholo). La Ministerio pri Defendo ne agnoskas, ke la toksaĵoj estas specifa problemo de la armeo, ĉar tio estas ĝenerala problemo de la socio ; sed fakto estas, ke en la kazernoj kreskas alarme la konsumado de toksaĵoj, kaj la junuloj tute fajfas pri armeaferoj. Nun ne taŭgas la alvoko al patriotismo nek al "elviriĝo" por allogi ilin (nin) : laŭ la enketeto, kun la frazo "La sanaj junuloj, kiuj ne volas armeservi, estas malbonaj patriotoj" ne konsentas 55 % el la loĝantaro kaj 72 % el la soldatoj.

Pri la akcidentoj dum la armeservo timas pli la loĝantaro ol la armeservantoj ; ĉi tiuj ne pensas, ke iĝi estas tre oftaj ; sed ĉiuj same opinias, ke iĝia plej ofta kaŭzo estas la senrespondeco de la junuloj. Kie oni plej timas la akcidentojn, estas en la Ministerio pri Defendo ; ne vane en 1984 soldato vunditis ĉiun 160an minuton, mortis ĉiun 44an horon, kaj provis sinmortigi ĉiun 80an horon (el kies provoj efektiviĝis 40 %). Laŭ statistikaj informoj rezultis pli da vunditoj kaj mortintoj en la armeservo ol en aliaj civilaj laboroj. La plejmulto el tiuj

akcidentoj okazis ekster la servhoroj kaj dum vojaĝoj pro forpermesoj ; laŭ la Ministerio, por eviti tiajn akcidentojn oni devas unue malebligi mallongdaŭrajn forpermesojn, kaj due agrabligi la kazernojn, por ke la soldatoj ne forkuru el iĝi por esti kun siaj familioj kaj fianĉinoj dum nur kelkaj horoj.

Sed la problemo, kiu plej maltrankviligas la aŭtoritatulojn kaj la armestabon, estas la grandega nombro de memmortigoj : en 1984, 110 soldatoj provis sinmortigi, 41 el ili plenumis sian celon. La indico de memmortigoj estas eĉ pli granda en la armeservo ol en malliberejoj. Por provi eviti ĉi tion, de ĉi jaro oni faros psikologiteston al la rekruto por trovi tiujn psike nestabilajn ; sed oni devas dubi pri la efikeco de tio, ĉar ja multaj junuloj eĉ simulas esti frenezaj por ne armeservi sed ili ne sukcesas.

Laŭ multaj fakuloj, ne utilas provi solvi unuope ĉi ĉiujn problemojn, ĉar estas fakto, ke 80 % el la soldatoj opinias, ke oni devas multe malgrandigi la daŭron de la armeservo ; 85 % asertas, ke ili lernas nur malagi ; kaj 62 % pensas, ke armeservo estas nur lernejo pri malvirtaĵoj. Do la tuta sistemo de deviga armeservo estas en krizo. Necesas profunda reformo.

Jen kelkaj rezultoj el la enketo :

	Loĝantaro (%)	Soldatoj (%)
ĈU BONAS POR LA JUNULOJ FARI ARMESERVON?		
- Bonas	47	23
- Nek bonas nek malbonas	23	26
- Malbonas	28	51
KIA ARMESERVO ESTAS PLI BONA POR LA SOCIO?		
- Deviga	34	17
- Volonta	63	82
LA SOLDATOJ RICEVAS BONAN ARMEINSTRUADON		
- Konsentas	51	33
- Malkonsentas	46	68
KIOM DA TEMPO DEVAS DAŬRI ARMESERVO?		
- Malpli ol unu jaron	60	80
- Unu jaron	35	18
- Pli ol unu jaron	4	1
OPINIO PRI LA DUJARA SERVO CIVILA POR ARME-RIFUZANTOJ		
- Bona	21	18
- Devas daŭri unu jaron	55	61
- Inter unu kaj du jarojn	6	10
- Ne devas esti permesata	12	10

Loĝantaro (%) Soldatoj (%)

ĈU SANA JUNULO, KIU NE VOLAS ARMESERVI, ESTAS MALBONA PATRIOTO ?		
- Konsentas	43	28
- Malkonsentas	55	72
KAZE DE MILITO, ĈU VI MORTUS POR VIA LANDO?		
- Jes	41	32
- Ne	34	41
- Dependas de tio, kontraŭ kiu estus la milito	20	19

**Francisco A. ANTÚNEZ ROMERO**

\*\*\*\*\*

**KIO ESTAS NOVA ? KIO MALNOVA ?**

Antaŭ nelonge, en Francio, aperis jena porgazeta reklamo : "Jen fine gazeto, en kiu oni nenion legas pri AIDS".

Efektive, oni nun multe parolas, skribas kaj aŭdas pri la t.n. "AIDS"-malsano, kiu estas ŝatata temo de tiuj, kiuj ne havas verkinspiron (kiel la aŭtoro de tiu ĉi artikolo?).

Temas pri malsano, Akirita Imun-Deficit-Simptomaro, kies viruso detruas korpan defendsistemon kontraŭ malsanoj (eĉ ĝis morto), kaj kies disvastiĝo, dum oni ne precize scipovas kuraci ĝin, estigas panikon en multaj landoj, precipe en Usono kaj Okcidenteŭropaj landoj. Du aspektoj de tiu timego estas notindaj laŭ la vidpunkto de homaj socioj.

AIDS-malsano disvastiĝas en jarmilfina, ĝenerala etoso favora al malraciaj sciencaĉoj, al ideo pri "dia justeco", "apokalipso". Tio ne estas nova : oni komparu kun etoso en Mezepoka Eŭropo ĵus antaŭ la jaro Mila, kiam regis samspeca paniko pri baldaŭa mondfino.

Cetere, la AIDS-viruso transpasas pere de homaj aŭ pli precize viraj sekrecioj kaj alispecaj likvaĵoj : sango, salivo, spermo. Tiurilate, eĉ nun tabue estas paroli pri sekso. Plie, en Usono la unuaj viktimoj de tiu malsano estis samseksemuloj - tio ne pro la naturo mem de ilia seksagmaniero, sed pro ilia vivmaniero, laŭ kiu, ofte, seksa vivo estas pli riĉa ol tiu de malsamseksemuloj. Kompreneble, ankaŭ ĉi-lastaj estas trafeblaj, sed oni emas forgesi tion. Ja samseksemuloj daŭre estas apartigataj de multaj aliaj, laŭ false asertata "moralo" kaj, en la ĉi-supraj landoj, laŭ ideo pri "dia ordo" : ĉu oni ne aŭdis, antaŭ kelkaj jaroj, francan altekleziulon paroli pri ili kiel pri "alispecaj mensmalsanuloj" ?


(fino malsupre de la venonta paĝo)

## korbaĉov kaj reagan

Sur la fenestrorando kuŝas korbo.  
Malnova, malpura, truita, putranta.  
Ĝin elektis birdo kiel sian neston.  
En tiu nekutima birdhejmo kuŝas ovo.  
Ĝin gape, timeme ĉar senpove,  
observadas ĉiuj infanoj de la tero,  
por vidi, ĉu l' **korbaĉov'** sentos la  
**reagan** impulson, kiu eksplodigos  
la tutan globon.



Aldonu literon al la antaŭa vorto,  
por formi novan laŭ la difino.



Male, multaj scienculoj asertas, ke psikaj procezoj de evoluo al samseksemo aŭ malsamseksemo estas kompareblaj, kaj ambaŭ estas partoj de homa naturo. Tamen, multnombraj estas la fanatikaj kontraŭdirantoj, kvankam iom malpli aŭdataj de kelkaj jaroj, ĝis.... Nun, paniko pri AIDS estas nur preteksto al ilia revigliĝo. Longe oni povus debati pri tiu malsano, sed tiuflanke ĝi indas je vigla atentemo : laŭ fama aserto, "vekigigas maljunaj demonoj".

Ĉu vi memoras pri apartiginsigna, rozkolora stelo ?

Bruno COMENTALE

## MALMISTIFIKI TERORISMON

Dum la lasta mondmilito, la Vichy-registaro kvalifikis "teroristojn" la partizanojn de la "Libera Francio". En 1982 ankaŭ la pola gazetaro nomas "teroristojn" la aktivulojn de Solidarność. Se vi troviĝas en la rangoj de armeo, kiu luktas en ombro, aŭ de senperforta rezistado, tiuj, kiujn vi kontraŭbataladas, povas same facile etiketi vin teroristo. Tiun konfuzan nocion oni troige kaj elaste uzas. Ĉar terorismon prave timas (simpla) homo, la ŝtato povas ĝin uzi kiel oportunan propekan virkapron. Ĝi eĉ foje inventas "teroristajn agadojn" aŭ manipulas ilin por pravigi kaj legitimi sian subpremon. Sed trans tiu politika uzo de la terorista timigilo, se ĝia minaco estas reala, troigita aŭ fiktiva, kion ni devas nomi terorismo ?

Fakte terorismo unue estas regsistemo, totalisma koncepto de la povo, kiu fondas sian potencon sur la praktikado de teroro. Terorismo enkorpiĝas en bombeksplodiganto aŭ ostaĝkaptanto nur pro bildoj kutime alportataj per kino aŭ literaturo. Ekzistas do terorismo de la regantoj, kiun ne enfokusigas la aktualaj, kiel ekzemple spektinda ostaĝkapto, terorismo multe pli diskreta, sed certe pli efika kaj pli kutime uzata : tiu de la ŝtatteroro. La ŝtatteroro konsistas el praktikado de mortminaco kontraŭ la ŝtatkontraŭuloj. Ĝia efiko baziĝas ne nur sur fizika detruo de la malamikoj, sed ankaŭ kaj eble ĉefe sur ĝia kapablo, starigi kolektivan timegon por paralizigi ĝin. La ŝtatteroro havas du flankojn : Interne de la nacio mem ĝi nomiĝas nacia sekureco, kaj disvolviĝas dank'al lerta trafa uzado de la amaskomunikiloj kaj praktikado de la fidenuncoj, malaperigoj kaj torturoj. Ĝi frapas ĉie en la mondo, en Argentino kiel en Sovetio, en Turkio kiel en Vjetnamio.

La alia flanko de la ŝtatteroro estas tiu, kiu etendiĝas trans la limoj de la grandaj potencaj landoj. Ĝin oni pudore nomas "la nuklea malpersvado". Sed tiu atoma ŝtatteroro estas vera terorisma strategio, ĉar ĝi ĉantaĝas la vivon de miloj kaj milionoj da senkulpaj viktimoj. La plej terura, la plej pereiga, la plej detrua el la nuntempaj terorismoj estas la atoma armilo.

En mondo, kie la ŝtatoj tiom kutime uzadas la mortminacon kontraŭ siaj malamikoj, ĉu en- ĉu eksterlandaj ; en mondo, kie politika efikeco ŝajne tiel bone harmonias kun terorlingvo,



kiel miri, kiam kelkaj forlasitaj homoj, forgesitaj de la historio, uzas tiun saman lingvon por valorigi siajn rajtojn? Terorismo de la fortuloj generas terorismen de la malfortuloj, ĉar ĉi-lastaj opinias, ke terorismo estas la lasta solvo por aŭdigi sin. Terorismo de la minoritataj grupoj estas imito de la ŝtattero laŭ pli malgranda skalo.

Ne pro tio ni devas "ekskuzi" terorismen. Sed ni devas tamen denunci la hipokritecon de la oficialaj oratoroj. Stigmatizi terorismen signifas ne nur skandaligi antaŭ la spektaklo de neutile verŝita sango, aŭ antaŭ la sinteno de homoj, kiuj ne hezitas mortigi aliulojn por sia propra batalo.

Stigmatizi terorismen signifas ankaŭ denunci la cinikecon de politika logiko, kiu proklamas la respekton de la Homaj Rajtoj, sed kulise ilin ĉiutage ofendmokus, kiu sentence alvokas pacon kaj dialogon, sed konas nur la praktikadon de perforto.

Estas do tro facile aparte prezenti terorismen kaj analizi ĝin kiel fenomenon disigitan de la kunteksto, en kiu ĝi evoluas. Oni ofte prezentas ĝin kiel malsanon, kiu de interne rongas la socion. Fakte ĝi estas nur simptomo de socio malsana pro perforto. Ne ekzistas bona legitima perforto kaj malbona terorisma perforto. Terorismo estas la fatala finstadio de perforto. Estas same nura endentaĵo de perforto pli-malpli kruelega sed ĉiam tiom detrua. Estas ankaŭ tre oportune, prezenti teroristojn kiel simplajn krimulojn aŭ frenezulojn soifantajn je sango. Teroristo ne estas nenatura homo instigata de paranojo. Ni ne devas vuali la veran signifon de tiu formo de politika batalo.

Certe en la teroristaj grupoj estas kelkaj fanatikuloj. Sed alie estas la kaŭzoj kaj la elfluoj de terorismo, kia ajn ĝi estas: pal estina, vaska, kurda, itala aŭ irlanda. Ĝiaj radikoj enprofundiĝas en kompleksaj situacioj historiaj, politikaj, psikologiaj religiaj... kaj meze de kulturaj aŭ naciaj grupoj, ĝenerale humiligitaj de la historio.

Pro siaj adoptitaj rimedoj terorismo estas unu el la ekstremaj fazoj de perforto kiel torturo aŭ nuklea strategio. Tial ni devas ĝin malmistifiki.

### LA SENPERFORTO-DEFIO

Preni sur sin sian morton, egalas nei la ŝtatpovon, ĉar la mortantaĝo, kiun ĉi-lastaj organizas, ne turmentas la senperfortan rezistanton. Kaj ĉar senperforto ne damaĝas la fizikan integrecon de aliuloj, ĝi ne devige provokas la venĝprocezon kaj ĉiukaze igas ĝin pli delikate disolvebla kaj pravigebla.

Tial subpremado de senperforta agado estas pli malfacila ol subpremado de terorista agado.

En siaj intimaj esencoj terorismo kaj senperforto ne estas tiom malproksimaj, kiom ŝajnas unuavide. Ambaŭ konsistas el simila batalformo: defii la morton dum alfrontado kontraŭ la ŝtatoj, ĉiam pli rigidaj, kaj ĉiam malpli pretaj akcepti radikalan opozicion. Sed terorismo kaj senperforto troviĝas entute malaj, koncerne siajn rilatojn kun la morto. La unua pensas povi spiti la morton blinde mortigante, la dua celas ĝin preni sur sin, sen mortigi. Ne ekzistas revoluciritmo tiel ke la subprematoj unue provas senperforton, kaj poste pro malespero uzas perforton. Ekzistas nur strategia, historia kaj radikala elekto inter perforto kaj senperforto. Fronte al la potenco de la ŝtatoj, kiuj toleras nek demokratikan debaton nek laŭlegan protestoformon, restas nur du solvoj: TERORISMO AŬ SENPERFORTO !!!

Marcelo

## KAMPANJO POR ABOLO DE LA MORTPUNO EN ĈIUJ LANDOJ

"Ĉiu homo havas la rajton al vivo, libereco kaj sekureco de la persono."

"Neniu devas esti submetata al torturo aŭ kruela, malhumana aŭ humiliga traktado aŭ puno."

Artikoloj 3 kaj 5 de la Universala Deklaro de la Homrajtoj.

La mortpuno malobeas la rajton vivi. Malgraŭ tio en minimume 136 ŝtatoj la mortpuno estas laŭleĝa. Ankoraŭ hodiaŭ en multaj ŝtatoj la mortpuno estas aplikata. Tiun praktikon influas diversaj kulturaj, sociaj, religiaj, ekonomiaj kaj politikaj faktoroj.

Kia ajn faktoro influas, kiun ajn metodon oni aplikas - la mortpuno ĉiam estas kruela, malhumana kaj humiliga puno. Pro tio oni nepre devas agi kontraŭ la mortpuno kiel la mondovasta helporganizo "amnestio internacia"

Japanio : 513 ekzekutoj en 27 jaroj

Laŭ la informoj de la japana ministerio pri justico, 513 homoj estis pendigitaj inter la jaroj 1947 kaj 1974. En 1975 publikiĝis 17, en 1978, tri ekzekutoj.

Plej ofte, laŭ la sciigo de amnestio internacia, la mortpuno

estas trudata pro jenaj kvar punendaj agoj :

- mortigo
- rabado kun mortigo
- seksperforto kun mortigo
- krimbruligo de konstruaĵoj, en kiuj troviĝas homoj.

Inter 1960 kaj 1975, 206 homoj estis ekzekutitaj. El tiuj 81 procentoj estis deklaritaj kulpaj pri rabado kun mortigo, kaj 17 procentoj pri mortigo. La restantaj du procentoj entenas la deliktojn : krimbruligo kun mortigo (1 kazo), mortigo de parencoj (2 kazoj) kaj seksperforto kun mortigo (1 kazo).

Laŭ la legitima japana kriminala juro, la mortpuno povas esti trudata por 13 deliktoj. Aliaj leĝoj ekvalidis en la jaro 1978, kaj trudas la mortpunon por ankoraŭ du aliaj deliktoj. Deviga estas la aplikado de la mortpuno por tiuj homoj, kiuj iniciatas ofendmiliton de eksterlanda potenco kontraŭ Japanion. Por la restantaj 14 deliktoj, la juĝisto povas ankaŭ decidi malpli gravan punon.

Sekvas pliaj deliktoj, kies konsekvenco estas la mortpuno :

- instigi ribelon kun la celo renversi la registaron, okupigi la ŝtatan teritorion, aŭ fari aliajn agojn kontraŭ la ekzistado de la nacio.
- aliĝo en armeo aŭ alia milita subteno de militstrategia potenco, kiu agas kontraŭ Japanion.
- atenco per eksplodaĵo kun mortigo.
- superakvegigo de konstruaĵoj, en kiuj loĝas homoj aŭ trafikiloj.
- detruoj de trajnoj aŭ ŝipoj, kiam homoj pro tio mortas.
- endanĝerigi la trafikon kun morto kiel sekvo.
- venenado de trinkakvo kun morto kiel sekvo.
- mortigo al parencoj aŭ al parenco de la edzo aŭ edzino.
- mortigo dum duelo.
- teroristaj agoj, ekzemple forrabo de aviadilo kun mortigo.

En oktobro 1956 oni komencis en la ministerio por justico tute tralabori la 70-jaraĝan libron pri kriminala juro. Pro multaj sugestoj de interesataj grupoj de la socio, ĝi ankoraŭ ne estas finita hodiaŭ. La nuna registara koncepto ankoraŭ konsentas kun la aplikado de la mortpuno. Efektive, la nombro da punendoj agoj, pro kiuj la mortpuno estas aplikata, malpliigis je ankoraŭ 7 deliktoj. Kaj la mortpuno ne plu estu ordonata. Aldona koncepto postulas, ke oni traktu la publikigadon de la mortpuno kun speciala ekzakteco. Sed oni ankoraŭ ne scias, ĉu kaj kiam tiu koncepto estos prezentata al la parlamento por akcepto.

Paroli pri mortpuno ankoraŭ restas tikla temo en Japanio. La plimulta loĝantaro estas por mortpuno. Eĉ maldekstruloj aprobas kaj pravigas la mortpunon. Iam mi menciis tiun temon en letero al mia japana leteramiko, kunsendinte flugfolion kontraŭ la mortpuno. Mi demandis lin, ĉu eble li povus ĝin traduki en japanan lingvon por poste doni ĝin al gazeto.

Mi ĉiam ŝatis skribi diskuti kun li pri politikaj kaj sociaj problemoj. Ofte mi rimarkis samajn ideojn, ekzemple pri paco, malarmado... Mi do esperis, ankaŭ pri tiu temo, ekscii ion interesan pri japanaj klopodoj kontraŭ mortpuno. Mi certis ke mia amiko samopinias. Kia mirego, kiam mi ricevis jenan leteron ... :

"Kara Ursula.... Kun granda interesiĝo mi tralegis vian lastan leteron. Ja vi estas aktiva junulino. Vi kontraŭbatalas kontraŭ tia grandega temo. Kiel vi bone scias, en nia lando preskaŭ ne ekzistas grupo, kiu kontraŭbatalas tian aferon. Kiel jam vi rezonas, mi ne priscias pri tia grupo, nek pri tia persono. Mi havas nenian rimedon por kontaktiĝi kun la grupo, kaj plie mi pensas, ke preskaŭ neniu interesiĝas pri la afero. Kion mi povas fari por vi, tio estas nur traduki la flugfolion kaj sendi ĝin al ĵurnalo, sed mi devas rimarkigi, ke nur se oni interesiĝus pri tia movado, oni prenis ĝin por ĵurnalo. Sed vi ne povas atendi multon. Ĉar jam mi antaŭsentas, ke neniu sentos intereson pri la temo. Ĉu oni multe interesiĝas en Eŭropo pri la temo ? Mi, persone, ne staras kontraŭ mortpuno. Ĉu vi miras ? Ekzemple, kion vi farus kun krimulo, kiu forrabas kaj mortigas infanon kaj postulas la prezon de forrabitito ? Ĉu vi povas pardoni tian krimulon ? Kia estus la sento de la patrino ? Ĉu vi povus imagi la grandan ĉagrenon, se la krimulo fariĝos libera de la morto ? Ekzistas krimoj ekstreme kruelaj, kaj por pagi la ŝuldon, per kio oni povus likvidi ? Nur per la propra vivo... mi pensas. Ne nur mi, sed ankaŭ multaj aliaj, jes !

"Ni devas malĝoji, ke troviĝas monto da krimoj kaj krimuloj en la mondo. Ja ni malamas krimojn, do tiam ni devas forbalai tian aĵon el nia ĉirkaŭaĵo. Antaŭ ol diskuti pri la mortpuno, ni devas pripensi pri teruraj krimoj. Se malmultiĝus krimoj, tiam malmultiĝus ankaŭ mortkondamnitaj. Pensu ne nur pri krimuloj, sed ankaŭ pri la viktimoj!

(...) "Vi povas skribi al ĉiuj anoj de SAT, loĝantaj en nia lando, sed mi ankaŭ havas dubon : ĉu ili emus movadi por la afero ? Nu, mi vidas ĉion kun granda interesiĝo. Kial vi ne kontraŭbatalas militojn ? La milito estas pli granda problemo kompare kun la mortpuno, ĉu ne ? Tie, en batalkampo, mortas monto da soldatoj kaj ordinaraj homoj. Ĉie ekzistas fajrero, kiu kaŭzas bataladon. Vi devas bone observi arabajn landojn, kaj lastatempe okazis batalado ĉe Glenada, kiu troviĝas en la maro Kariba. Ni homidoj estas malfortaj kaj neperfektaj vivantaĵoj, kaj staras multaj problemoj antaŭ niaj okuloj. Eble, por neniam ni povos liberiĝi de tia kateno, bedaŭrinde..." T.

Tiu ekzemplo pri la kruele mortigita infano estas tipa eldiro de aprobanto de mortpuno.

Jes, certe, estas kruele mortigi infanon, mortigi homon. Sed estas vere strange, laŭ mi, kiel oni distingas mortigojn :  
- oni pravigas mortigojn de miloj da homoj dum milito. Tio ja estas io tute alia, oni ja devas fari tion por la patrio. La murdisto por siaj multnombraj mortigoj ricevas laŭdojn. Ne, oni ne mortigas lin.

- sed oni mortpunas unuopan homon, kiu mortigis unu aŭ kelkajn personojn. Ne miskomprenu, mi tute ne aprobas tion, sed ankaŭ ne pravigatan morton dum milito. Ambaŭ estas teruraj kaj kruelaj agoj.

Laŭ mi, oni ne simple diru, ke tiu estas murdisto kaj do oni punu lin per lia morto, kaj ke tio estas justeco. Kia justeco! Oni devus kompari la faktojn, kial tiu "murdisto" mortigis. Feliĉa homo certe neniam mortigas. Oni devas konsideri la cirkonstancojn, ĉar ofte tiuj murdistoj estas kompatindaj homoj, kiuj ne estas akceptataj de la socio, kiuj vivas en mizeraj cirkonstancoj, ne havas laboron, aŭ estas psike malsanaj. Ĉu do ne estus pli bone, kuraci tiujn homojn, por ke ili poste vivu kiel sanaj homoj ? Por kiu utilas ilia mortpuno ?

Tiu ekzemplo pri la patrino estas simpla, primitiva. Kompreneble, ŝi suferas pro la mortigo de ŝia infano, sed ĉu ŝi malpli suferas, se la murdinto estas mortpunita ? Tio ne redonas al ŝi ŝian infanon.

Tre danĝere estas uzi la mortpunon kontraŭ homoj persekutataj, opoziciaj aŭ minoritataj, kiuj ne estas agnoskataj de la ŝtato. La ŝtato volas elimini ilin. Kio do estas pli facila, ol kondamni ilin al morto pro ago, kiun ili neniam faris ? La bona ekzemplo estas Sacco kaj Vanzetti, tiuj du italaj elmigrintoj. Unu estis anarkiisto, la alia socialisto. Ili iris en Usonon en tiu tempo kiam komunistoj estis malamataj. Pri ĉio malbona oni kulpigis la komunistojn. Ilin oni mortpunis pro mortigo, kiun ili neniam faris. Post dek jaroj la kortumo esploris ilian senkulpecon. Kia helpo al ili kaj iliaj familioj ! Same strange, ke en Sud-Afriko estas mortpunataj plejofte nigruloj, batalantoj por libero kaj defendantoj de la homaj rajtoj. Plejofte tiuj kondamnitaj al mortpuno estas malriĉuloj, kiuj ne povas pagi bonan advokaton. Ĉar ili ne havas monon, ili devas pagi per sia vivo. Tio estas maljusteco !

#### Ursula Redoulez

Mi interesigas pri la opinioj de Laŭte-legantoj el Japanio koncerne mortpunon. Eble kelkaj povus kontribui en venontaj eldonoj de Laŭte ?

# nia filmo

**NENIO ESTAS MALEBLA** - aŭ la fascina vivrakonto de JENTEL kun insisto pri la egaleco inter viro kaj virino.

Antaŭ kelkaj jaroj en kelkaj landoj filmo eniris la kinejojn kun tuja sukceso, kiu mirigis ankaŭ la kritikistojn. Ili tute ne atendis tiun triumfon. Ili antaŭe eĉ mokridetis pro la filmo al ĝia reĝisoro... eble ĉar bedaŭrinde virino ne estas entute agnoskata de la socio ?

Kiom multe da diferenco ekzistas inter viro kaj virino dum la ĉiutaga vivo ? Oni ja povus pensi, ke hodiaŭ formalaperis la primitiva opinio, ke virino apartenas al la domo, malantaŭ la forno kaj "nur" prizorgas la infanojn. La pli altaj salajroj kaj la pli interesaj diskuttemoj ĉiam estas afero de la pli inteligenta parto de la homaro : la vira !

Parte malaperis tiu kliŝo kaj virinoj hodiaŭ post longa batalado akiris rajtojn, ekzemple koncerne laboron. Virinoj eniris ankaŭ la politikan medion (tamen mi devas rimarkigi : kiom da viroj kompare al virinoj eniras parlamentojn?). Bedaŭrinde tro multaj ankoraŭ pensas, ke la forta kaj pli kapabla sekso restas la vira.

Pri la filmo :

Antaŭ 16 jaroj Barbara Streisand, aktorino kaj kantistino, konata precipe pro muzikaj filmoj, unuan fojon legis la rakonton de juna knabino, nomiĝanta Jentel. Ĝi drame spegulas multajn similaĵojn de ŝia propra vivo. Fascinite de tiu libro, ŝi deziris nepre fari filmon pri ĝi. 12 jarojn ŝi batalis por surekrantigi tiun rakonton. Ĉiam viroj, reĝisoroj kaj kritikistoj malkonsilis al ŝi daŭrigi. Laŭ ili tiu filmo ne alportus grandan sukceson, tio signifus perdon de multaj investaĵoj. Sed B. Streisand insistis. Pro rifuzado de reĝisoroj filmi tiun historion, ŝi fariĝis la unua virino, kiu filmis sian propran filmon kiel produktistino, reĝisorino, ĉefaktorino kaj kantistino!!! La filmo pretis 4 jarojn post sia eldonpermeso.

Pro la granda sukceso la antaŭaj kontraŭuloj devis konfesi, ke virino povas esti tiom bona reĝisorino kiel viro, kelkfoje eĉ pli bona. La filmo mem ricevis du Holivudajn premiojn : plej bona filmo kaj plej bona reĝisorino de la jaro 1983.

JENTEL - rakonto pri virino komence de la 20a jarcento.

Ekde la infanaĝo Jentel ne estas kiel la aliaj knabinoj. Sian junaĝon ŝi pasigas sur kamparo en malgranda vilaĝo ie en



Bohemio. Ŝia patrino mortas tuj post la nasko. Jentel do vivas kun sia patro en malgranda domo. De li, severa rabeno, ŝi multon aŭdas pri la Talmudaj skribaĵoj. Laŭ ŝi ili ŝajne portas ion de la granda, interesa mondo, de la fascina vivo de la studentoj. Tiuj, kiuj rajtas studi, demandi siajn profesorojn kaj do akiras pli da saĝo kaj inteligento.

Sed ĉio tio restu por ŝi nur revo neniam atingebla, ĉar tiun belan mondon rajtas esplori nur viroj. Kia mizero de virina vivo! Kiom ofte ŝi demandis: "Kial? Kial mi ne rajtas? Mi ja ne estas pli stulta ol tiuj lernantoj de paĉjo." Kial ŝi kuiru, lavu, gladu, purigu, kvankam ŝi pli volonte partoprenus la studentan vivon? Kial oni devigus ŝin fari ion, kion ŝi tute ne ŝatas? La patro komprenas sian filinon kaj vespere, kaŝe, li instruas al ŝi la Talmudon. Kaŝe, ĉar estas malpermesate paroli al virino pri tio. Vole-nevole li konstatis, ke ŝi estas lia plej diligenta kaj inteligenta lernant-ino. Avide ŝi englutas ĉiujn paĝojn, ne laciĝas demandi sian patron. Kelkfoje li mem ne scias respondi. "Kio fariĝos el ci, kiam mi ne plu estos?" demandas li. Ŝi mem ne scias, ŝi scias nur, ke ne taŭgos por ŝi deviga, stulta porina vivo. Ŝi aĝas pli ol 20 jarojn, kiam ŝia patro mortas. Jentel kun abomeno aŭdas la vilaĝanojn diri al ŝi: "Ni zorgos pri ci, ci zorgos pri la mastrumado ĝis ci finfine trovos edzon." Edzo, mastrumado, ha! tute ne! Rigardante sian vizaĝon en spegulo ŝi fortondas siajn longajn jarojn, murmurante "Pardonu min, paĉjo." Survoje ŝi renkontas multajn junulojn, studentojn. Ŝiaj okuloj brilas. Ŝi intermiksas sin kaj prezentas sin per la nomo Anŝel. La plejmulto de la junuloj ridas pro ŝi. "Kion ci volas, malforta knabeto? Iru hejmen al cia patrino!". Unu eĉ volas batali kun ŝi, por mezuri ŝiajn fortojn. Subite intervenas barbulo, kiu protektas ŝin. Li nomiĝas Avigdor kaj proponas al Anŝel kuniri por studi en lia talmudlernejo. Ŝi volonte akceptas. Diskutante, ili atingas la urbon, kie troviĝas la lernejo. La morgaŭon, ŝi sukcesas la enirekzamenon kaj baldaŭ fariĝas la plej bona lernanto.

Ŝi povus esti kontenta, ĉar ŝi atingis, kion ŝi volis. Ŝi ja feliĉas ankaŭ pro la studado, sed renkontas pli kaj pli da malfacilaĵoj. Ekzemple, ŝi ne povas sin bani aŭ naĝi kun la junuloj. Kiam Avigdor volas devigi ŝin, ŝi plorante forfuĝas. Ŝi ne rajtas montri siajn sentojn. Kaj ŝi havas tiom da sentoj, belaj kaj malbelaj, kiujn ŝi nepre devas subpremi. Pli kaj pli ŝi renkontas konfliktojn de sia identeco.

Ho, kiel bela sento, kiam ŝi estas kun Avigdor! Ŝi sentas pli ol simplan kamaradecon. Ĉu ŝi amas lin? Kion fari?

Sed li fianĉiĝis kun Hadass, la filino de fama rabeno. Unu fojon semajne Avigdor kaj Anŝel vizitas tiun familion por vespermanĝi kaj Anŝel tre plaĉas al ili. Hadass estas bela knabino, sed, laŭ Anŝel, stulta kiel ĉiuj aliaj virinoj. Ŝiaj nuraj okupoj konsistas el: kion ŝi kuiras hodiaŭ? kian robon ŝi surmetos? kiel ŝi kombos siajn harojn?

Kiam Anŝel parolas al Avigdor pri siaj pensoj, li diras nur: Kompreneble oni ne povas diskuti kun ŝi, sed ŝi ja estas virino, kaj ne kapablas diskuti. Ŝi estu aminda, bela kaj zorgu pri la edzo. Tiel virinoj estu, kaj tiel mi amas ŝin." Tio ŝokas Anŝel. Kial ĝuste ankaŭ li pensas, ke viroj mense superas virinojn? Ŝi ja pravas la malon. Sed li ja ne scias, kaj li amas nur adorantajn kaj submetitajn virinojn. Ho, se ŝi nur povus pruvi al li, se ŝi nur povus diri, ke ŝi amas lin! Avigdor rimarkas, ke Anŝel ne kondukas kiel kutime. Kiam li tuŝas ŝin aŭ frapas ŝian ŝultron, ŝi tuj ekscite demandas: "Kial ci ĉiam tuŝas min kaj rigardas min tiel strange?". Li ne respondas, ĉar li tute ne povas klarigi al si ŝian sintenon.

Iun tagon, Avigdor ne akurate alvenas al ilia rendezuo. Anŝel ĉie serĉas lin kaj finfine trovas lin en sinagogo. Li ŝajnas tre ekscitata kaj aspektas malĝoja. Avigdor rakontas, ke la gepatroj de Hadass eksciis, ke lia frato ne mortis pro malsano, sed ke li memmortigis sin. Memmortigo estas granda peko tiutempe, kaj pro tio ili postulis ekfianĉiĝon. Sed li amas ŝin, kaj ŝi amas lin. Malespere li rigardas Anŝel-n kaj subite ekkrias: "Jen la solvo! Anŝel, ci estas mia plej bona amiko. Mi amas Hadass-n kaj estus ege malfeliĉa, se ŝi edzigus alian viron. Se ŝi edzigos cin, mi estos kontenta, tio ne ĝenos min, ĉar mi scias, ke ci bone zorgos pri ŝi!"

Anŝel pensas, ke ŝi freneziĝas. Nekredeble. Ĉu ŝi edzinigu Hadass-n? "Ne. Tion ci ne povas postuli de mi, ne, ne!" ŝi krias kaj forfuĝas. Avigdor volas forlasi la urbon. Lastatempe Anŝel atingas lin, li jam sidas sur ĉaro. "Li forlasas min", ŝi pensas. "Avigdor, Avigdor, revenu, mi petas. Mi faros, kion ci volas, mi edzinigos Hadass-n, sed restu!"

Avigdor restas kaj Anŝel edzinigas Hadass-n. "Ĉu mi estas freneza? ĉu diabla? Ho, paĉjo, ci ĉiam volis danci dum mia geedziĝfestoj, sed mi certas, ke ci ne feliĉe dancus dum tiu festo. Ĉu mi nun estas viro aŭ virino?"

Okazas granda festo. Hadass ĝojas, ĉar delonge ŝi admiras Anŝel-n kaj Avigdor feliĉas scii sian amatinon bone prizorgata. La unuan nokton Anŝel ruze fuĝas el la edzina volupto. Ŝi klarigas al Hadass, ke ŝi certe bezonas tempon por forgesi

Avigdor-n kaj do ne ŝatas nun la seksan kuniĝon kun iu alia. Al la terurigo de Hadass, ke ŝi estas lia edzino kaj do devas emi kiam li emas, Anŝel klarigas, ke eĉ en la Talmudoj estas skribite, ke edzino ne devas submetiĝi, i.a. en seksaj rilatoj. Anŝel tiom longe parolas pri la Talmudaj skribaĵoj, ke Hadass poste vere ne plu emas. Por liberigi siajn proprajn opiniojn, kaj sentigi ke virino havas rajtojn, Anŝel komencas instrui al Hadass la Talmudon. Tagon post tago, Anŝel sentas, ke Hadass pli kaj pli amas ŝin. Des pli venas konfliktoj. Fine, ŝi ne plu eltenas. Ŝi amas Avigdor-n kaj amas Hadass. Ambaŭ ilin ŝi trompas, kredigante ke ŝi estas viro. Sed ŝi timas, kaj ne scias kiel diri la veron sen difekti ilin.

Ŝi invitas Avigdor-n pasigi kelkajn tagojn en alia urbo. Larmoj kovras ŝiajn vangojn, kiam ŝi adiaŭas al Hadass. Ŝi bone scias, ke neniam pli ŝi revidos tiun amindan virinon, kiun ŝi vere ekamis.

Atingante la urbon, ili luas dormĉambron. Tie post longa hezito kaj dubo Anŝel finfine volas malkaŝi sian sekreton al Avigdor. Ŝi enkondukas: "Avigdor, imagu, se ekzistus leĝo, kiu malpermesus al ĉiuj barbuloj studi, kion ci farus?"

- Kompreneble, mi tamen studus.

- Eĉ se ci devus trompi ?

- Jes, kial tiu stulta demando ? Mi ne devas pripensi. Mi ja rajtas studi."

- Avigdor, ĝuste tion, kion ci ĵus aprobis, mi faris. Ĉar al mi ne estis permesate studi, mi trompis. Mi vestis min kiel viro, sed kedu min, mi estas virino." Unue Avigdor pensas, ke ŝi ŝercas. Tiam Jentel kun tremanta voĉo diras: "Do, mi pruvos al ci!" kaj malfermas sian ĉemizon. Li vere ne fidus siajn okulojn. Ŝokite, li krias: "Sorĉistino, diablino, kial ci faris tion? Ne tuŝu min, ci estas amikino de Satano." Kiam li trankviliĝis, li demandas ŝin, kial ŝi nenion diris al li, kaj eĉ edzinigis Hadass-n?

- Ĉar mi cin amas kaj volis resti apud ci", esploras Jentel.

Avigdor konfesas, ke ankaŭ li ŝin amas kaj jam komencas plani: "Ni geedziĝos, cia geedzeco kun Hadass ne valoras." Jentel ekbrilas: "Ho jes, ni studos kaj havos loĝejon..." Nun ĉagreniĝas Avigdor: "Ci ne studos. Ci estas virino, kaj ne rajtas. Ci atendos min ĉiutage, tio estas laboro de virino! Ne, mi ne studu kun virino!". La morgaŭon ili adiaŭas unu la alian. "Fartu bone, Avigdor. Edzinigu Hadass-n, ŝi amas cin kaj estas virino, kiel ci deziras. Salutu ŝin de mi kaj petu, ke ŝi pardonu. Diru, ke mi amas ŝin."


Finiĝas la filmo. Avigdor edzinigis Hadass-n. Unu jaron

poste ili havas filon, al kiu ili donas la nomon Anŝel.

Jentel iras al Usono, kie virinoj rajtas studi. Finfine, post longa peniga tempo ŝi atingas sian celon, ĉar ŝi pravas: **NENIO ESTAS MALEBLA.**

Ursula Redoulez

**NIA DEFIO !**



**HORIZONTALA**

- I. Por sinjorino, estas tio aŭ nenio en S.A.T.
- II. Minerala magnezia silikato. Komenco de la ebrio.
- III. Bando (literumante). Senordeco de la movoj.
- IV. Trinkafon. Plimalgrandigas. Malantaŭ iuj aŭtoj.
- V. Glando.
- VI. Mucida. Nun solaj.
- VII. Inversa pronomo. Metaloid' uzata en farmacio.
- VIII. La unua parto de tavolo. Kovri per riĉa metalo. Foje.
- IX. Tie oni faras ion (sen finaĵo). Respondo al, ekzemple: "Kies estas?"
- X. Ĵargon'. Sudirlandano.

**VERTIKALE**

- A. Emociitaj.
- B. Kiam oni rigardas de tie, povas okazi konfliktoj. Enspirite vidi.
- C. Itala "E". "Oicizoperp"
- C. Profitoj.
- D. Kiam ĝi estas telefona, oni ne uzos ĝin por fiŝkapti (sen finaĵo).
- E. Ne ŝatas la aeron.
- F. Altrangulo. Lingvaj Respondoj.
- G. De iu demono.
- G. Meritanta nenion. Hokajdan'.
- H. Grekaj moneroj. Mallongigo por mikrono.



## 2 Noveloj de Ivan Žlibar

### LA FELIĈO NOMIĜAS ANGELA

Somero de jaro 1984. Angela Mary Orro Silva. Tiu ĉi nomo ekplaĉis al mi. Brazilo, interalie, estas lando, laŭ kiu mi kulturadas simpatiojn. Mi skribas leteron. La atendado estas pli longa ol vetero kaj cikatriĝas en herbaĉo de la forgeso. Mal-laŭte, monatoj forpasas, aŭtuno finiĝas. Mi ricevis leteron el Brazilo. "Hm, kiu skribas?" - La leteron skribis Maria, Maria Cristina C.Ac Caligari. Mi jam forgesis Angela-n. Tamen, Maria skribas ĝuste pri Angela kaj pri ŝia malsano, peza malsano, artritreŭmatismo. Tiam mi eksentas malfeliĉon kaj pezan silenton de Angela, de ŝia koro. Ŝi volonte skribus al mi, sed ŝi ne povas skribi pro sia malsano, ŝi ne povas skribi... Maria ankoraŭ skribas, ke ili aŭdis pri fama doktoro el Jugoslavio, Franc Ciale, kiu ektrovis la sanigilon por tiu malsano. Ili petas mian helpon.

Tuj, ĉi-vespere, mi respondas, ke mi faras ĉion por trovi lin, lian recepton kaj liajn instrukciojn. Samtempe mi skribas leterojn al tri doktoroj el Jugoslavio, du estas Esperantistoj. Jam la morgaŭon mi sendas leterojn kaj samtempe mi alvokas informservojn. Kie vivas doktoro Franc!?! Tiam mi ankoraŭ ne scias, ke la skribita nomo ne estas la ĝusta. Mi telefonas al Beograd, al Ljubljana, al Sarajevo. Ĉiuj respondoj estas samaj, negativaj. Tria tago : Mi reprovos pere de la telefona informservo de Zagreb, de Ŝibenik kaj de Titograd. Ĉiuj tra-serĉoj restas vanaj. Kvara tago : El Novi Sad, el Skoplje kaj el Rijeka mi ricevas samajn negativajn respondojn. Ho Dio mia, kion fari ? La postajn du tagojn mi vojaĝas al Beograd. Tiam mi eniras en poŝtejon kaj tralegas jugoslavan telefonan nomaron, sed sen rezulto. Tri tagojn poste intertempe mi ricevas negativajn respondojn al miaj leteroj. Mi vizitas mian filinon, kiu vivas kun miaj gebopatroj. Tiam mi aĉetas revuon "ARENA", kiun mi ordinare legas. Ho Dio mia, ho ĉiuj anĝeloj...

Sur iu paĝo estas skribita titolo : LA MIRAKLO NOMIĜAS PUDINGO - Acida pudingo... Por via sano... dr. Franc Tihole. Mi tralegas la artikolon dufoje, jes, tiu estas la kuracisto, kiun mi serĉas, sed lia ĝusta nomo estas Tihole. Pro tio mi ne povis trovi lin. Reveninte hejmen, mi tuj alvokas informservon el Ljubljana kaj mi ricevas telefonan numeron de doktoro Franc Tihole. Ho Dio mia, kiom da turmentoj pro mal-ĝusta nomo. Tamen, tri tagojn poste mi havas ĉion por sendi al Angela. Tuj la morgaŭon mi sendas leteron al ŝi kaj ankoraŭ unufoje mi skribas al ŝi, bondezirante novjaron kaj sukcesan kuracadon.

\* \* \* \*

Printempo 1985. Mi ricevas leteron de Alcur G. Almeida el Brazilo. Li skribas pri Angela, pri ŝia dankemo, ĉar ŝi ricevis mian sendaĵon. Tio estas unua faciligo por mi. Tuj, mi respondas kaj skribas ankoraŭ dufoje al Angela. Tamen, atendado estas pli longa ol longeco, pli peza ol pezeco kun odoro de necerteco. Kaj somero pasas. Silento...

Aŭtuno 1985. Mi ricevas novan leteron el Brazilo. La letero kiu feliĉigas min, mian spacon, mian momenton. Angela skribis ĝin, propramane! Mi eksaltas pro feliĉo kaj ektrinkas unu, du, tri glasetojn honore al ŝia letero. Ĉu infanoj ĝojas tiel ? Mi retralegas ĝin... "kaj mi fartas multe pli bone ol dum pli fruaj monatoj, dankon...". Ankoraŭ unu fojon mi tra- legas ĝin. Sur la mapo Brazilo kaj urbo Taubate estas tre proksimaj kaj ĉarmaj al mi kaj el Taubate - Ŝi.

Dank'al Esperanto mi nun havas mian esperantan fratinton, mian kontentecan, kaj tiu kontenteco, tiu feliĉo havas sian nomon, sian formon, sian sencon, kompreneble, la feliĉo nomiĝas ANGELA.

### RIGARDO EL OMBRO

Se mi opinius kiel Walter, mi parolus pri virino, ĉar virino povas doni sinceran amikecon, se ŝi estas kiel RUMIANA. Se mi opinius kiel Frojd, mi parolus pri amo kaj amikeco, ĉar amikeco amo estas, se estas kiel RUMIANA. Tamen mi opinias kiel Ivan Žlibar, mi ŝatas apartenadon kaj spiritan bezonon... mi pensas en ombro de malnova ponto. Murmurojn de ondoj kaj mian pripenson venkas tonoj de kanto de Gabrova ĥoro. El malnova palaco disiras voĉoj, belegaj voĉoj. Inter ĉiuj mi rekonas ŝian voĉon... RUMIANA kantas. Printempo



kantas. La odo elfluas el Ŝi. En mia koro estas silento...  
Ho Dio mia, mi ne havis monon por bileto. Tamen la silento  
estas nur mia, do almenaŭ io estas mia.

Mia koro batas laŭ la taktoj de la kanto. Mi perdis la senton  
por tempo, alvokus gnomojn, sed vana tio estus, mi scias,  
scias.

Sur ŝtuparo de la palaco - Ŝi. Ŝtupoj iel flavetaj kaj ek-  
dormantaj pro longdaŭra tempo. De printempoj kaj de epokoj,  
kiuj ripetigās, verdaĵoj per novaj restaĵoj kreskas apud Ŝi.  
Nur Ŝi estas unika, kiel ŝia vero. El neĝblankaj sandaloj ŝi el-  
kreskas kiel rufa rozo. En sia rufa robo Ŝi estas la floro de  
printempo, de printempa kanto.

Ŝi karesas verdaĵon... Vento de antaŭseno korodas mian  
haŭton. Kiel decembra bastardo mi staras en ombro de mal-  
nova ponto kun mia refreno de la silento... Mi estas tie ĉi, ĉar  
mia loko tie ĉi estas, ĉe l' rango de almozuloj. Ho, Kalvario,  
mi ne almozpetas monon, mi estas almozulo por la amo.  
Mi alirus al Ŝi, gratulus Ŝin, donacus al Ŝi bukedon da belaj  
rozoj, sed mi ne havas monon.

Kie mi estas, mono ne estas bezona. Sufiĉe estas havi  
Walter kaj Frojd, malsaĝetan koron, kaj la suno faru la ombron.

Ivan ŽLIBAR - Ivano


#### SILABENIGMO

Kunmetu la silabojn al ĝustaj vortoj. Se vi havas ĉiujn dudekunu,  
eblas malkovri konsilon, legante vertikale la unuajn, poste la  
triajn literojn de ĉiu vorto.

a - alu - ana - ba - cio - da - di - di - duo - ele - eno -  
era - fan - fi - ga - go - in - ismo - kam - ko - kon - kro -  
ku - li - li - lo - lo - lo - lo - log - me - me - na - na - neo -  
neo - njo - no - no - nu - or - pa - pi - pi - re - ri - ro - ru -  
so - son - sta - ta - ti - to - to - to - trans - tri - u - ur.

1. Religiano ne agnoskanta ununuran dion.
2. Riverhavena urbo en Francio.
3. Dolĉa, manĝebla ŝajnfrukto.
4. Kloŝforma floro, plejofte blua.
5. Malgaja.
6. Tempo inter kontaĝado kaj apero de malsano.
7. Paroli nacilingve inter esperantistoj.
8. Karesnomo por Ursula.
9. Granda mamulo kun rostro.
10. Mezuri profundecon de io.
11. Medikamento buletforma.
12. Malĝustaĵo.
13. Plej interna el la okulaj membranoj.
14. Fajrilo el ligno.
15. Virine nomo.
16. Elimini ŝviton tra la haŭto.
17. Plej valora premio ĉe Olimpikaj Ludoj.
18. Nova adepto de iu ismo.
19. Granda rivero en Centra Afriko.
20. Nomo de la hindia lingvo.
21. Vorto nove enkondukita en lingvon.

(fobo)




#### T I E N

Tien, kie korvo  
kaj laro  
dividas la neston ...  
Tien, kie leono  
kunvivas  
kun kapreolino ...

Tien mi kondukus  
la plej malgajan,  
la plej malriĉan  
infanon,  
ke li ne malĝoju.

Ivan ŽLIBAR - Ivano



## AL RUMIANA

Mi skribus kantojn p*Ri* vi...  
mi scias n*Ur* inspiron, sed  
al *Mi*, vi estas pli ol tio,  
pli bela ol beleco,  
pli kar*A* ol amikeco...  
al mi nur sile*N*to restas,  
la silento, kiun mi *A*mas.

## KOMPREENBLE KE MI ŜIN AMAS

Ŝi estas io pli ol amo  
sed virino -  
kompreneble ke mi ŝin amas.  
Ventoj  
plirapidigu vian iron,  
malplektu ŝian hararon  
kaj malfermiĝos mia ĉirkaŭpreno  
por ŝia junaĝo,  
por ŝia rideto.  
Spite al ĉiuj  
ŝi estas io pli ol amo  
sed virino -  
kompreneble ke mi ŝin amas.  
En miaj pezaj momentoj  
ŝi estas vorto de konsolo,  
ŝi estas kontraŭ larmoj,  
ĉar  
ŝi estas io pli ol amo  
sed virino -  
kompreneble ke mi ŝin amas.

Ivan ŜLIBAR - Ivano

## VOĈO DE LA SENTO

Malfermu la pordon de  
matenuĝo  
sed ne saltu, ne saltu...  
Iru malrapide al nova  
renkonto,  
la suno ne estas nur via.  
Se vi rigardas nur vin  
vi restos sola  
en biografio de la silent'.  
Vi serĉas senton  
kaj amon...  
Sola ?!  
Por amo bezona estas  
duopo !  
Tiam la sento  
anoncos ŝian alvenon.  
Vi povas esti daltonisto  
en la okuloj  
sed ne estu daltonisto  
en la koro,  
ĉar nigra virino  
povas doni feliĉon  
al blanka homo,  
ĉar flava infano  
povas helpi al ruĝa  
maljunulo.

Tial - neniam estu sola en la animo,  
nenio estas tiom granda kiom amo.

## NOBELREĜINFANOJ

Jen estis du nobelreĝinfanoj  
kaj ambaŭ kun am' en korfund'.  
Sed kunen ili ne povis veni  
pro de la lago profund'.

Amato, se vi kapablas,  
jen transen naĝu al mi.  
Kandelojn tri mi bruligos  
kaj ili lumos por vi.

Jen sidis fi-monaĥino  
en ŝajnodorm' ĉe l'fon'.  
Ŝi la kandelojn elblovis.  
La knabo mortis de dron'.

Patrino, kara patrino,  
dolor' en la kap' estas plag'.  
Permesu do, ke mi iros  
promeni iom ĉe l' lag'.

Filino, kara filino,  
sed sola ne iru vi.  
La junan fratinton veku,  
kaj iru do kun ŝi.

Patrino, kara patrino,  
fratino estas infan'.  
Ŝi plukos ja ĉiujn florojn  
en la arbar' per la man'.

Patrino, kara patrino,  
dolor' en la kap' estas plag'.  
Permesu do, ke mi iros  
promeni iom ĉe l' lag'.

Filino, kara filino,  
sed sola ne iru vi.  
La fraton, la junan veku,  
kaj iru do kun li.

Patrino, kara patrino.  
La frato estas infan'.  
Li kaptos ja la leporojn  
en la arbar' per la man'.

Patrino baldaŭ ekdormis,  
kaj la filin' kun persist',  
Ŝi tiel longe promenis,  
ĝis vidis ŝin fiŝist'.

Ŝi diris al la viro :  
Elfiŝu por mi kaj la am'  
kaj ruĝoro droninton.  
Li estas nobelreĝinfan'.

La viro longe do fiŝis  
ĝis la eltrov' de l'korp'.  
Li kaptis lin ĉe l' haroj  
kaj trenis al la bord'.

Ŝi prenis lin en la brakojn  
kaj kisis buŝen lin.  
"Adiaŭ, karaj gepatroj.  
Ni plu ne vidos nin."

tradukis HGK  
aus den Knaben Wunderhorn

## LITERATURA KONKURSO

### Ĉiu esperantisto rajtas partopreni !


Inkumu vian skribplumon kaj lasu vian fantazi- poeziverkemon gvidi ĝin. Retrovu la revolandon de via infanaĝo kaj rakontu fabelon.

### Temo : PORINFANAJ RAKONTOJ

Ĉiuj partoprenantoj donace ricevos la venonte eldonatan SAT-broŝuron. La diversaj premioj konsistas el libroj, kasedoj, T-ĉemizoj kaj abonoj al L! Ni parolis eĉ pri senpaga partopreno en SAT-Junulfaka renkontiĝo rekompence al la suprepremiata junul(in)verko. Pro tio bonvolu mencii, ĉu vi estas malpli ol 35-jara kaj en kia kategorio vi konkuras :

### ORIGINALOJ aŭ TRADUKOJ

Do vekigu kaj revu laŭte ! Sendu viajn tekstojn antaŭ la fino de oktobro '86 al : Marcelo REDOULEZ, literatura konkurso, 8, rue Colette, F - 33150 CENON.



## ESPERANTISTAJ FERIADOJ EN MIĘDZYGÓRZE

Wrocława Filio de Pola Esperanto-Asocio invitas al tradiciaj E-feriadoj en Międzygórze :

\* La 5-a Internacia Feriado "Esperanto hejme", kiu okazos en la tagoj 16-29 de aŭgusto 1986

\* La 22-a Internacia Esperantista Feriado "Ora pola aŭtuno", kiu okazos en la tagoj 1-14 de septembro 1986.

**Loko** : Pitoreska ripozloko Międzygórze en Sudety-montaro, 130 km sude de la regiona urbo Wrocław. Enloĝigo kaj programo en 14 apude situantaj alpstilaj ripozdomoj. Ĉarmaj pejzaĝoj, pura aero, profundaj boskoj, kristalokvaj torrentoj, milda klimato kaj kvieto kuracas homojn lacigitajn pro industria civilizacio. En ĉirkaŭaĵo - atrakciaj, piedaj kaj aŭtomobilaj turismaj itineroj. Międzygórze estas pilgrimloko al Maria **la Neĝa**, kronita de Papo Johano Paŭlo la Dua.

**Programo** : Diversgradaj konversaciaj kursoj, fundamenta kurso laŭ "Cseh-metodo", esperantologia seminario, kultura kaj distra programo en Esperanto, lumbildprelegoj, kantvesperoj, diskdancado, maskobalo, ĝojfajro, montaraj pied-ekskursoj, aŭtoĉaraj ekskursoj k.a. Samtempe okazas kelkaj kursoj aŭ programoj laŭvole akcepteblaj. En ĉiu feriskipo partoprenos 488 personoj.

Kadre de ambaŭ feriskipoj okazos tradiciaj renkontoj :

- de esperantistaj familioj kaj gentoj,
- medicinistoj/membroj kaj simpatiantoj de UMEA,
- bibliotekistoj-esperantistoj.

En la feriskipo "Esperanto hejme" estas antaŭvidita riĉa kaj atrakcia programo por infanoj kaj junularo.

### Feriu kun viaj familianoj !

Pliajn informojn kaj aliĝilojn petu de : Pola Esperanto-Asocio, P.O. Kesto 16, PL 50-952 Wrocław 17, Pollando.

(Aliĝoj estas akcepteblaj ĝis la 15a de junio).

Katarina Mróz (23-jara studentino pri oligofreni-pedagogio), adreso : al. Grunwaldzka 176/6, PL 80-266 GDAŃSK, Pollando deziras korespondi kun samfakaj studentoj kaj kun personoj laborantaj en specialaj lernejoj.

\*\*\*\*\*  
 La "Laŭtejo" vendas : 2 tre bonkvalitajn aparatojn necesajn por multobl-igado per stenciloj :  
 \* Gravurilo por elektronaj stenciloj Rex-Rotary 2002 (pro tuj posta ekuzado de ofseta tekniko, tre malmulte funkciis), prezo : 6000 FF  
 \* Stencilmultobligilo Rex-Rotary **D490** (elektra motoro, pluraj rapidumoj, aŭtomata inkumado, reviziita) 4000 FF  
 Skribu al : C. Baudé, F 47340 Laroque Timbaut.  
 \*\*\*\*\*



## SOLVOJ DE LA ENIGMOJ

Enigmo de paĝo 44 :

S  
AS  
NAS  
SANO  
SONJA  
SONĜAJ  
SENĜOJA  
KANSEĜOJ  
NASKIĜEJO  
SEKIĜONTAJ  
GOJETRINKAS

Krucvortoj de paĝo 55 :

Horizontale :

I. KAMARADINO. II. OLIVENO. EB.  
III. RT. ATAKSIO. IV. TEON. ET. NL.  
V. TIROIDO. VI. ŜIMA. ORFAJ. VII. IM.  
BOR. VIII. TĀ. ORI. IAM. IX. AGEJ.  
ALTIU. X. JID. EJRANO.


Vertikale :

A. KORTUŜITAJ. B. ALTE. IMAGI.  
C. MI. ED. Ĉ. AVANTAĜOJ. D. RET.  
E. ANAEROBIAJ. F. DOKTORO. LR.  
G. IFRITA. Ĝ. NEINDA. AIN. H. OBOLOJ.  
MUO.

Silabenigmo de paĝo 58 :

"Praktiku Esperanton kun geamikoj tra la tuta mondo"

1. PaGano
2. RuĜno
3. AnAso
4. KaMpanulo
5. TrIsta
6. InKubacio
7. KrOkodili
8. UnJo
9. ElEfanto
10. SoNdi
11. PiLolo
12. ErAro
14. AlUmeto
15. NaTalia
16. TrAnspiri
17. OrMedalo
18. NeOfito
19. KoNgo
20. UrDuo
21. NeOlogismo



\*\*\*\*\*